

marto 1971
64-a jaro
n-ro 784 (3)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Gen Londono

Vi trovos

apartan emfazon en ĉi tiu numero je la temo Londono. La nombro de aliĝintoj jam superis mil, kio signifas, ke la stadio de la unuaj preparoj finiĝis kaj ke tiu de definitivigoj komenciĝis. (De post la dua monda milito la meza nombro de aliĝintoj al la Universalaj Kongresoj estis iom pli ol du mil). Sur la tuj sekvantaj paĝoj la kongresa sekretario skizas la antaŭvideblan aspekton de la londona Kongreso, kaj ni aldonas kelkajn konkretajn informojn kaj kongreslandajn scenojn.

Tiu emfazo ne signifas, ke ni ignoras la plimulton de nia legantaro, kiu ja ne povas regule ĉeesti Universalajn Kongresojn. Kontribuoj el Ameriko kaj Soveta Unio (paĝoj 44–49) helpas redoni la ekvilibron.

Al la libroamantoj, kiuj kutimas aŭde serĉi la rubrikon 'Laste aperis..' en ĉiu numero de Esperanto, ni pardonpetas pro ĝia manko ĉi-foja, kiun kaŭzis ŝajna paŭzeto en la Esperanta eldon-agado. Ĝi reaperos en la aprila numero, kiel kutime.

Enhavo

- 41 Bonaj aŭguroj por la monda manifestacio de la Esperanto-movado (Nevan)
- 42 Lastaj novaĵoj pri la Universala Kongreso
- 44 Por riĉigi la sciencan literaturon (Gonĉarov)
- 44 Simboloj, signoj: universala lingvo
- 46 Aruba: miniatura babelo en la kariba maro (Mulders)
- 50 Recenzoj
- 50 Nekrologo Julia Isbrucker, Chagnoux, Carnap, Garbar
- 52 Lerneja Bulteno n-ro 19: S.U.K. '72 Lieĝo
- 54 Loke - Fake
- 54 Kiu pioniris? (Avoto)
- 56 Leteroj de legantoj
- 57 TEJO-paĝo: Junularo kaj kulturo
- 58 Oficiala informilo n-ro 443: laŭlanda membro-statistiko
- 58 Esperanto en radio
- 60 Anoncetoj

La kovrilo

Londono estas plena je kontrastoj. Super la kreneloj de la palaco St. James, hejmo de la princino Margaret, leviĝas turo alistila: tiu de la petrol-kompanio Shell, kiu staras trans la rivero Tamizo. En la densa trafiko de la strato St. James kaj aliaj stratoj en la ĉirkaŭaĵo alternas luksaj aŭtomobiloj kun la monde konataj ruĝaj londonaj aŭtobusoj kaj la malnov-aspektaj sed praktikaj taksioj. La palaco St. James ne estas vizitebla por la publiko, sed ne mankas aliaj palacoj, muzeoj, galerioj kaj aliaj vidindaĵoj, kiuj malfermas siajn pordojn al turistoj kaj kongresanoj. . . .

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Redaktoro: f-ino A. Nagata

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por aerpoŝto aldonu: Aŭ-lío kaj N-Z. 13,75 gld. jare; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Us., Meks. 5,50; Isr. 2,75 gld.

Anonc-tarifo: 1 p. = 285 gld., ½ p. = 150 gld.; ¼ p. = 85 gld.; 1/8 p. = 50 gld.; 1/16 p. = 35 gld. Kliŝkostoj ekstre. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Grafisch Bedrijf Tuijtel, Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 87 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.G.

Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: U.J. Moritz, D-5161 Merken, Andreasstr. 57, F.R. Germanujo.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris 17e, Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj eldonaĵoj: J. Uśpieński, Poŝtkesto 100, Warszawa-12, Polujo.

Estrarano pri financoj kaj administrado: E.J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Bonaj aŭguroj por la monda manifestacio de la Esperanto-movado

La jam longe daŭrinta striko de PTT-dungitoj en Britujo iom bremsis la aliĝadon de britoj al la venonta Universala Kongreso kaj metis ĝenan obstaklon antaŭ la laboron de LKK en Londono. Malgraŭ tio, kaj dank' al pli intensa uzado de la telefona reto, la organizado progresas glate kaj la aliĝado restas sur nivelo pli alta, ol tiuj de la lastaj kvar jaroj. Ĉi-sube la Konstanta Kongresa Sekretario rigardas la perspektivon.

Ne, sendube Londono ne estas sole la metropolo de la Brita Regno. Ĝi ankaŭ ne estas nur la antikva "Tower Bridge" (Turponto), historia Abatejo Westminster, majesta Palaco Buckingham, pompa Katedralo de Sankta Paŭlo, fama Parko Hyde, frivola Piccadilly Circus aŭ legenda Scotland Yard. Tiu riĉa reĝa urbego sur la rivero Tamizo signifas ion plian. Jes, Londono estas precipe kaj ĉefe la Mekko de kongresemaj movadanoj en la 1971-a jaro.

Juneca temperamento

Sub Alta Protektado de la Lordurbestro de Londono Sir Peter Studd disvolviĝas la laboroj por la 56-a Universala Kongreso. Atenta observanto certe rimarkos kelkajn novajn kaj pozitivajn fenomenojn. La serioza respondeco de la lokaj organizantoj — bazita sur plena konscio pri la cirkonstancoj — por la transprenita tasko, trovas aktivan subtenon de la kongreslanda esperantistaro, kiu ne nur multnombre aliĝas al la kongreso, sed samtempe ankaŭ grandanime garantias ĝin kontraŭ eventuala financa risko. *Vigleco kaj juneca temperamento* estas ilustreblaj per la favora mezaĝo kaj la multaj helpantoj, kiuj pretas kontribui al la efika kaj glata funkciado de la kongresaranĝoj. Fine, kaj eble plej okulfrappe vidiĝas la *originaleco* en la solvado de diversaj rutinaj taskoj, ekzemple sur la kampo de reklamado aŭ la servoj por la kongresanoj. Kvankam ne ĉiuj novaj ideoj povas esti realigataj, tamen la klopodoj en si mem prezentas bonvenan modernigon.

La kongresaj ejoj

La Kongresejo *University College* estas parto de la Universitato de Londono. Ĝi situas proksime de la centro, kaj ĝi estas facile atingebla per pluraj linioj de la subtera fervojo aŭ de la aŭtobusoj. La impona Royal Festival Hall (Reĝa Festivala Halo), kiu pro sia novstila arkitekturo kaj bonega akustiko fariĝis elokventa muzika centro en Londono, akceptos la kongresanojn por la solena Inaŭguro. Tuj post ĝi okazos samloke la Kongresa Lunĉo, nun la unuan fojon provota, kiu celas konservi la festan etoson de la malferma ceremonio ankaŭ tra la tagmeza manĝopaŭzo. Tiun ĉi kaj aliajn sciigojn detaligas la Oficiala Bulteno, aperinta meze de februaro 1971.

Ankaŭ pri la loĝado oni ne bezonas havi zorgojn, kondiĉe ke oni frue mendas. Por tiuj, kiuj mendas antaŭ la 20-a de majo 1971, estas rezervitaj diversprezaj litoj en hoteloj kaj studentaj loĝejoj, kelkaj eĉ tre proksime aŭ relative proksime de la kongresejo.

La kongresa ekskursiva servo proponas ĉi-jare paletaron da allogaj celoj: tradiciaj rondvojaĝoj en la urbo kun aŭ sen vizitoj al famaj objektoj, tuttagaj veturoj kaj vizitoj al histoririĉaj lokoj, kiel Windsor, Canterbury, Oxford, Cambridge, Stratford-on-Avon (urbo de Shakespeare) kaj multaj aliaj. Por tiuj, kiuj deziras restadi en Britujo por plia libertempado, la organizantoj ofertas unikajn eblecojn: postkongreson en Dublino, sestagan ekskurson al Skotlando, viziton al Exeter kaj trankvilan ferioestadon en Barlaston.

Dusemajna kongreseto

Dum la ĝejnuloj preferos iri al Edinburgo por la 27-a IJK de TEJO, la plej junaj esperantlingvanoj povos longigi la restadon en la 12-a Internacia Infankongreseto ĉe Dover per aldona semajno. Tiun ĉi novan aranĝon oni enkondukis precipe por favori la gepatrojn, kiuj intencas partopreni en unu el la postkongresaj aranĝoj, kaj la lerneajn grupojn.

La kongresa laborprogramo estas definitivigata. Unu el la ĝeneralaj kunvenoj traktos pri "La problemoj de lingva komunikado en la nuntempa mondo". Ĝi aparte konsideros la pozicion de la grandaj naciaj lingvoj kompare kun la neŭtrala Esperanto kaj perspektivojn por la estonteco.

Sian fakkunvenon jam anoncis dudeko da fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj, inter ili juristoj, fervojistoj, skoltaj, instruistoj, muzikistoj, aŭtomobilistoj kaj aliaj.

El la kulturaj aranĝoj elstaras la prelegoj de la Internacia Somera Universitato, belartaj konkursoj kaj la filmprezentadoj. Grava evento estos la teatra vespero. Bulgara Esperanto-Teatro prezentos la mondfaman komedion de Machiavelli "Mandragoro".

Jam pli ol mil aliĝis

Ankaŭ dum la 56-a UK prezentos sin TEJO per aparta aktivado dum la t.n. Junulara Tago. Apud la oratora konkurso, publika kunveno kaj komuna tagmanĝo ĝi organizos manifestacion en la urbo, ekspozicion kaj la junularan balon.

En la momento de la finredakto aliĝis 1065 personoj el 33 landoj. Anonciĝis sep naciaj flugkaravanoj. Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne decidis, estas rekomendinda distra 30-minuta sonbendo pri Londono, ĝiaj konataj kaj nekonataj aŭdindaĵoj, sonoj tipe britaj aŭ londonaj. Kun la sonbendo oni ricevos ĉarman libron "Jen Londono", kiu sur kvindekda paĝoj kun perfekta lingvaĵo, amuza stilo kaj originalaj ilustraĵoj certe entuziasmigis por la vizito ankaŭ vin!

Mikuláš Nevan



LASTAJ NOVAĴ

Delikata debat-temo!?

„Neŭtraleco de UEA — ĉu la nuna laŭstatuta koncepto estas adekvata?” Jen la temo de tre populara kongresa programero, kiu sendube elvokos atenton de ĉiu esperantisto, kiu sincere deziras kontribui al firmigo de la pozicio de UEA en nia tre komplikita kaj malkvieta mondo.

Praktika reklamaĵo

Kiel ĵus komunikite el Londono, la granda angla firmao Marks & Spencers decidis donaci al la kongreso 2 500 plastajn butikumsakojn kun reklamteksto en Esperanto.

Problemo de lingva komunikado

Por la ĝenerala kunveno de la 56-a UK, la Estraro de UEA elektis la temon “La problemo de lingva komunikado en la nuntempa mondo” kun la subtitolo “La pozicio de la grandaj naciaj lingvoj kompare kun la neŭtrala Esperanto kaj perspektivoj por la estonteco”. Por tiu kunveno oni intencas inviti reprezentantojn de ekzemple British Council, Goethe-Institut, la komitato por la propagando de la franca lingvo, la lingvistikaj institutoj de la Soveta kaj Ĉina Akademioj, Unesko k.a. Tiukaze la kunveno povus havi formon de forumo kun interpretado.


Gejunuloj konkursos en la parolarto

Monpremioj de 40 ĝis 100 nederlandaj guldenoj atendas la partoprenontojn de la ĉi-jara Oratora Konkurso de la Universala Kongreso. Ĉu kaptos ilin unu el la temoj?

1. “Ĉu la nuna junularo estas pli aŭ malpli idealisma, ol la antaŭaj junaj generacioj?”
2. “Ĉu ekzistas jam bazaj elementoj de tutmonda kulturo?”
3. “Nacia lingvo vaste uzata internacie kaj lingva imperiismo.”



Aŭtomobilistoj atentu

La Loka Kongresa Komitato atentigas ĉiujn, kiuj intencas uzi sian aŭtomobilon dum la kongreso, ke ne ekzistas ebleco parki aŭtomobilojn ĉe la Kongresejo. Oni rekomendas lasi aŭtomobilon aŭ ĉe la hotelo aŭ ekster la urbocentro kaj uzi la servojn de la publikaj transportiloj, t.e. subtera fervojo (Underground) aŭ aŭtobuso.



PRI LA KONGRESO

La ekskursprogramo de la 56-a Universala Kongreso ebligas al la kongresanoj vastan konatiĝon kun la variaj belaĵoj de la anglaj kaj skotaj pejzaĝoj kaj urboj. Kvarfoja rondvojaĝo en Londono mem ebligas enspiri la historiplenan etoson de la Abatejo Westminster (maldekstre: la kapelo de Henriko la Sepa). Unu el la tuttagaj ekskursoj penetros en la dekstran 'piedon' de Britujo, al Canterbury (sube) kaj aliaj pitoreskaj lokoj. Sestaga postkongresa ekskurso al Skotlando prezentos survoje ankaŭ multajn aspektojn de okcidenta kaj orienta Anglujo, inkluzive de la belpanorama laga regiono (dekstre). En la Bulteno, sendita al ĉiuj aliĝintoj meze de februaro, troviĝas detaloj kaj pliaj bildoj pri la ok dumkongresaj kaj 4 postkongresaj ekskursaj aranĝoj.



POR RIĈIGI LA SCIENCAN




Estas tute klare, ke por scienco Esperanto prezentas taŭgan solvon de multlingveco. Pruvi tion ne nur teorie, sed ankaŭ per praktika laboro estas tasko de ĉiuj esperantistoj, el ili de sciencistoj unuavice. Plej necesa laboro ĉi-rilate estas eldoni pli da sciencaj libroj en Esperanto, ellabori Esperanto-terminarojn, kaj subteni Esperanto-revuojn sciencajn (unuavice *Scienca revuo*) per altnivelaj artikoloj. Sed al mi ŝajnas, ke ni esperantistoj-sciencistoj ne ekspluatas ankoraŭ unu direkton en la temo "Esperanto kaj scienco", nome, reciproka helpo per scienca informado en Esperanto.

Mi skizu mian sperton. Antaŭ pli ol du jaroj mi

aperigis kelkajn anoncojn kun propono interŝanĝi tradukojn de necesaj kemiaj artikoloj. Tiel mi havigis al mi kaj uzis en mia scienca laboro 6 artikolojn, tradukitajn el la angla de s-ino M. Flint (Britujo), kaj artikolon el la rumana, tradukitan de s-ro P. Szentgyörgyi (Rumanujo). Responde kelkaj rusaj kemiaj artikoloj en Esperanto-vesto flugis al miaj gekolegoj. Ĉi tiuj tradukoj havas kelkajn bonajn trajtojn. Unue, dum tradukado de la artikoloj estas eble elprovi ekzistantajn Esperanto-terminojn kaj ĉe manko de tiuj krei la novajn. Due, akumuliĝas scienca Esperanto-literaturo. Trie, sciencisto mem ricevas rektan utilon de Esperanto, kio krome impresas ĉirkaŭajn kole-

SIMBOLOJ, SIGNOJ: UNIVERS

Esperanto ne estas la sola rimedo de internacia interkompreniĝo. Ekzistas aliaj internaciaj "lingvoj", kiel ekzemple la simbolsistemoj de muziko kaj matematiko. Tia estas ankaŭ la kreskanta simbolaro uzata sur ŝoseoj, en fervojaj stacidomoj, sur necesejaj poroj.... La ĉi-suba artikolo, tradukita kaj represita el "International Herald Tribune", amuze priskribas la strebadon de unu entuziasmo por kompletigi kaj normigi tiajn simbolojn. Kvankam bildoj ne povas anstataŭi kompletan lingvon, ili ja povas servi kiel 'suplemento'. Kopirajto: "Los Angeles Times".



La mondo parolas milojn da lingvoj. Ĉu povus ekzisti rimedo de "tutja komuniko", kiu faciligus aŭtoveturon de Leningrad al Vladivostok sen maltrafo de manĝo aŭ benzinejo, flugon ĉirkaŭ la mondo kaj trovon de necesejo en ĉiu ajn flughaveno? Aŭ maniero, laŭ kiu trijarulo en Gambio kaj trijarulo en Usono povos *legi* "Ne tuŝu — danĝero!" klare kaj tuj?

Henry Dreyfuss, dum jardekoj majstro de industria planado, opinias, ke tio povus ekzisti.

Li de jaroj enmetas paperpecetojn en siajn poŝojn por kolekti simbolojn el la tuta mondo. Nun en sia eleganta oficejo-loĝejo en South Pasadena, Usono, li estas okupita per mapado, klasifikado, redaktado kaj kolektado de simboloj el la tuta mondo por eldono de "simbolaro". Li esperas, ke ĝi ebligos "tujan komunikon" en la ĝangalo de Borneo, la vilaĝoj de

Gano, la flughaveno ĉe Tokio, la kvartaloj de Barcelona.

"Povas okazi, ke japana aviadilo traflugas naŭ lingvobarilojn," diras la alta, griziĝinta planisto. "Se oni provus diri 'Ligu la sekurzonon' aŭ 'Fumado malpermesita' en ĉiuj tiuj lingvoj, la aviadilo fariĝus unu granda anoncetsekcio."

Trafiksignoj


Trafiksimboloj — pli-malpli normigitaj en Eŭropo dank' al interŝtataj konsentoj, kiuj ebligas al eksterulo aŭtoveturi de Caen (Francujo) ĝis Positano (Italujo) kun nenio alia ol rideto kaj mapo — havas celon: Sekuro.

"Supozu, ke oni devus legi ĉiujn informojn. Oni karambolus kun la antaŭa aŭto aŭ kun la malantaŭa."



Simbolo de ... munikon" en la ĝangalo de Borneo, la vilaĝoj de

LITERATURON



A. GONČAROV

gojn.

Ne laste, kiel proponas s-ro P. Szentgyörgyi, eblas informadi pri Esperanto inter sciencistoj, kies artikolojn oni tradukas. Oni simple sendas t.n. petilon, en kiu oni petas permeson de la aŭtoro por traduki lia(j)n artikolo(j)n en Esperanton. Ekzemple kun unu soveta sciencisto el Minsk ricevinta petilon el Britujo, mi interŝanĝis kelkajn leterojn, fine pruvinte utilon de Esperanto.


Necesas fondi Sciencan Tradukservon ĉe UEA

Por kunordigi tradukistan kunlaboron de esperantistoj-sciencistoj UEA povas krei ion similan al Kores-

ponda Servo. Nome, unu respondeculo kolektu traduk-proponojn el aŭ de koncernaj lingvoj en Esperanton, kaj kontaktigu reciproke taŭgajn tradukontojn. Sola regulo estu, ke kopioj de ĉiuj Esperanto-tradukoj sciencaj nepre iru al la sama respondeculo, sekve al UEA, kiu eble povos iam tion eldoni. Krome titolojn de la jam tradukitaj sciencaj artikoloj de tempo al tempo necesus publikigi en *Esperanto* aŭ *Scienca revuo*, por ke ilin povu uzi ĉiuj dezirantoj. Mi pensas, ke iuj sciencistoj jam tradukis sciencajn artikolojn en Esperanton; do necesas jam nun ankaŭ ilin kolekti ĉe UEA.

Rimarkoj de la redakcio: La proponitan servon estus eble starigi en la kadro de UEA, sed (pro financaj motivoj) ekster la Centra Oficejo. Aliaj servoj jam funkcias glate sub la respondeco de unuopaj aŭ plur-opaj kunlaborantoj, ekzemple la menciita Korespondada Servo. Simile al tiuj servoj, la Sciencan Tradukservo devus financi sin mem: la uzantoj pagus la kostojn, dum la administrado estus senpage farata. Kiel respondeculo plej taŭgus persono kun larĝa ĝenerala scio pri scienco kaj disponanta pri fotokopia aparato. Kunlaboro kun ISAE estus kompreneble dezirinda. Se troviĝus taŭga administranto, estus eble proponi la starigon de tia servo al la estraroj de UEA kaj ISAE.

ALA LINGVO



(Triangulo — kiu en Francujo signifas "zorgu" — signifas en Usono "cedu" kaj "helikoptera surterejo", kaj en Hindujo "naskolimigo".)

"Ĉu ne estus bonege, se trijarulo ĉie ajn en la mondo tuj pensus *zorgu* ĉiufoje, kiam li vidas triangulon? Ĉe ĉia ajn paniko oni povas legi simbolojn pli rapide, ol vortojn." Luj signoj kaj simboloj jam estas universalaj.

"Inteligentaj homoj, dezirante interŝanĝi informojn, inventadis rimedojn por tuj interkompreniĝi," diras la homo, kiu jam kolektis, klasifikis kaj enfakigis 8 000 tiajn simbolojn, laŭ 1) grafika formo, 2) fako, 3) alfabeto.

Jupo = viro? Pantalono = virino?

Kelkaj estas facilaj, ĉar piktogramoj* tamen estas la fundamento de multaj lingvoj. Bovin-silueto indikus bovinan transpasejon en ĉiu ajn lando de la mondo. Sed kiel piktogramoj pri viro (portanta pantalonon) kaj virino (portanta jupon) sukcesus en Hindujo, kie viroj ofte portas jupon kaj virinoj pantalonon?

S-ro Dreyfuss prilaboras tion. Ĉi-momente li emas al la klasikaj biologiaj piktogramoj — cirklo kun suprena sago (facile memorebla, se oni pensas pri Marso, ŝirmilo kaj lanco), kaj cirklo kun malsuprena kruco (Venuso — virino kun manspegulo).

"Sed konata etnologino malsamopiniis kaj diras, ke la sola maniero senerare rekoni virinon tra la tuta

mondo estas per figuro kun mamoj," s-ro Dreyfuss diris.

Piktogramoj povas funkcii eĉ en landoj, kie la loĝantoj devas unue lerni ilin. Li desegnis testudon (por *malrapido*) kaj leporon (por *rapido*), kaj provis ilin. Eĉ mezafricano povas kompreni ilin. Ili estas arbitraj en lando kun nek testudo nek leporo. Sed ili funkcias.

Problemoj en bildigo

Li esperas, ke kiam la simbolaro estos kompilita, ĝi havos ian "aŭtoritaton", kiu logos ĉiujn akcepti tian "internacian lingvon". Tiel pakaĵo poŝtita en Nov-Jorko estos tuj komprenita en Jugoslavio aŭ Japanujo.

Ĝis nun Dreyfuss restas perpleksita pri unu afero: "Mi ankoraŭ ne vidis bonajn simbolojn por 'puŝu' kaj 'tiru'."

Pro alia afero li senkuraĝiĝis: "Usono ne adoptis la internaciajn trafiksignojn. Mi scias — mi ĵus trapasis ŝoforekzamenon kaj devis lerni de la komenco la signifojn de la signoj." Kial? "Kiu scias? — oni eĉ ne sukcesas akordigi la 50 ŝtatojn."

Konfuzita li estas pro alia afero. "Kial infanoj ne komprenas la venensignon de kranio kun krucitaj ostoj?" (Li daŭre testas infanojn — pro teorio, ke senvortaj signoj estas ankoraŭ pli gravaj por infanoj, eĉ vivogravaj.) Po naŭ el dek infanoj, kiam oni prezentis al ili la signon de kranio kun krucitaj ostoj, ridis kaj diris, "Piratoj!"

* Piktogramo = bildo de konkreta objekto aŭ ago, uzata kun semantika valoro.

ARUBA: MINIATURA BABELO EN

E. N. Mulders

Por loĝantoj de Nederlando, dudirekta flugo al Aruba, Suda Ameriko, kostas nur 1 500,— gld., 50% de la normala tarifo. Laŭjure, tiu eta, ĉarma insulo estas ne plu kolonio, sed integra parto de la Nederlanda Reĝlando. Temas, do pri "enlanda" flugo, por kiu ne validas la internaciaj tarifoj. Ĉimonte ni povas proponi al niaj legantoj kvarpaĝan libertempan flugon al tiuj tropikaj pejzaĝoj, dank' al la interekaptaj priskriboj de la delegito de UEA en Oranĵstad.

Rigardante mondmapon ni eble mire konstatas, ke inter Norda Ameriko kaj Suda Ameriko estas multe pli da akvo, ol da tero. Tie estas la Meksika Golfo kaj la Kariba Maro.

Multas la insuloj: la tielnomataj Grandaj Antiloj (Kubo, Haitio, Dominiko, Jamajko kaj Portoriko) kaj la Malgrandaj Antiloj (granda nombro da malgrandaj insuloj). Bahamoj, apud Florido, apartenas nek al la Grandaj Antiloj, nek al la Malgrandaj. La Malgrandajn Antilojn oni distingas kiel Alventajn kaj Subventajn insulojn: la unuaj troviĝas pli norde, do pli distance de la bordo de Suda Ameriko: ili estas en la uragana zono.

◆◆0◆◆0◆◆

Aruba — 30 kilometrojn longa kaj 8 km larĝa — 30 km norde de Venezuelo kaj 70 km okcidente de Curaçao, estas unu el la ses insuloj, kiuj estas de post 1953 egalrajta parto de la Nederlanda Reĝlando, same kiel Surinamo, kiu ne estas insulo, sed parto de la sudamerika kontinento kaj sufiĉe malproksime de la Antiloj Nederlandaj. Antaŭ 1953 la ses insuloj estis kolonio de Nederlando, nomata Nederlanda Okcidenta Indio. La nuna nomo estas Nederlandaj Antiloj, kaj la ses insuloj estas: Aruba,


Curaçao (la plej granda), Bonaire, St. Eustatius, Saba kaj St. Maarten, kiu estas duone franca.

1. IOM EL LA HISTORIO DE ARUBA

Kiel ni scias, Kolumbo malkovris Amerikon en 1492, kredante trovi alian vojon al Hindujo kaj Japanujo.

Alonso de Ojedo alboriĝis en niaj insuloj en 1499, do antaŭ la kvara kaj lasta vojaĝo de Kolumbo. Li trovis ĉi tie kelkajn indianojn venintajn perkanue el Venezuelo, kiu tiutempe certe ne nomiĝis tiel. La hispanoj pluvelis al la kontinento. Niajn insulojn ili poste moke nomis "insuloj senutilaj".

Tamen, en la posta historio, tiuj insuloj ludis gravan rolon, malgraŭ la manko de oro — nome en la tempo, kiam Holando en 1634, dum la fama 80-jara milito kontraŭ Hispanujo, konkeris la ĉefan insulon Curaçao, ne pro la supozita oro, sed pro la urĝe bezonata salo, kiu, pro tiu milito, ne estis plu havebla el Hispanujo mem. En la hispana periodo, do antaŭ 1634, la hispanoj havis indianajn sklavojn, sed en 1515 ili komencis importi negrajn sklavojn el Afriko. Ili sendis la indianajn plejparte al Venezuelo, kio klarigas, kial postrestis en Curaçao en nia tempo ne indianaj elementoj, sed multaj negraj.



La kurioza, flankenkreskanta arbo "Divi-Divi" estas ofte renkontata trajto de la pejzaĝo de Aruba. Fone: la monteto Hooiberg.

ARIBA MARO

Epoko de sklavo-komercio

Estas hontige sed vere, ke la negro-komercio estis dum multaj jaroj la granda enspezo de pluraj eŭropaj landoj en ĉi-tieaj kolonioj. Estas ankaŭ vere, ke la historio de sklavismo estas tiel aĝa kiel tiu de la homaro mem, kaj ke estis gradoj de sklavismo, sed por la sklavo-komercio ne ekzistas pravigebla argumento. Oni konsideris sklavon objekto, ne homo. Kaj longa batalo estis necesa por ŝanĝi tiun situacion. En la jaro 1814 oni per deklaracio kondamnis la sklavo-komercion, sed la sklaveco mem daŭris ankoraŭ plurajn jarojn. Anglujo aboliciis ĝin en 1833, Francujo en 1848, Holando en 1860 en Nederlanda Orienta Hindujo, kaj en 1863 en Okcidenta Indio (kie troviĝas niaj insuloj); Usono en 1865, post la Secesia Milito (1861-1865). Sed estas dubinde, ĉu eĉ hodiaŭ sklaveco ne plu ekzistas ie kaŝe. Multaj noblaj individuoj kaj ankaŭ kelkaj institucioj ludis laŭdindan rolon en tiu batalo por pli da humaneco por ĉiuj homoj.


Estas necese ion scii pri tiu historio por povi pli bone kompreni la nuntempan situacion de tieaj homoj kaj popoloj.

Nun io pri Aruba mem, la dua insulo de la Nederlandaj Antiloj. Nuntempe oni eĉ ŝatus ŝanĝi la nomon, forprenante la adjektivon, kiu povus sugesti koloniecon, sed nomo kiel Antía ne estas bone uzebila, ĉar ĝi validas por ĉiuj insuloj en la Kariba Maro, kaj plie ni ne forgesu, ke eĉ la ses insuloj kune estas nur tre malgranda parto de la kariba regiono. Sed mi devas limigi min al tio, kion mi mem scias aŭ spertis.

En 1816 estis 1732 loĝantoj en Aruba, el kiuj 1396 estis liberaj kaj 336 sklavo, plejparte indianaj, kontraste al Curaçao, kies 2323 sklavo estis ĉiuj negroj. Plue en Aruba estis ankaŭ laŭprocente malpli da sklavo. En 1863 la sklaveco ĉi tie aboliciigis, kiel mi jam diris.

Multnacia

La insulo havas belan tropikan klimaton, sed ne posedas oron aŭ aliajn mineralojn; malofte pluvos, kio kaŭzas, ke la roka grundo, kvankam sufiĉe fekunda, ne povas produkti multe. Dum certa tempo oni trovis iom da oro; la ruinoj de orminejoj estas ankoraŭ videblaj, sed la ekspluato devis ĉesi pro manko de sufiĉa kvanto. Tial la nombro de loĝantoj restis malgranda, kaj la viroj devis iri al Kubo, Kolombio kaj Venezuelo por tie labori en la sukerkanejoj kaj regule sed ne ofte reveni al la hejma insulo. Sed en 1924 io ne-antaŭvidebla okazis: konata petrol-kompanio *Lago Oil and Transport Company* pro du cirkonstancoj elektis Aruba'n por ĉi tie rafini la nafton troveblan en Venezuelo: unue: la roka enirejo de la Lago de Maracaibo ne estis sufiĉe profunda por la grandaj ŝipoj (nun per modernaj metodoj oni forigis tiun obstaklon), kaj due: la politika kvieto estis tiutempe ĉi tie pli granda ol en Venezuelo mem.



Estis, kvazaŭ magiista bastono tuŝus la insulon. La arubaj viroj ne plu vojaĝis al najbaraj landoj por tie labori; el la aliaj insuloj — francaj kaj anglaj — venis familioj por vivi en Aruba, kiu iĝis multnacia insulo, ĉar ankaŭ pluraj eŭropanoj venis kaj homoj el Libano kaj Ĉinujo.

En 1937 Aruba havis 21 638 loĝantojn; jam granda kresko kompare kun la stabila nombro 8 000 dum la jardekoj antaŭaj. Kaj daŭre pliiĝis tiu nombro. La dua mondmilito iĝis la insulon ekstermezure grava. Regis granda prospero, de kio la komercio, la ekonomio ĝenerale kaj ankaŭ la kultura vivo, interalie la lernejoj, multe profitis. Tio daŭris ĝis proksimume 1959, kiam, pro la aŭtomatigo kaj la akra konkurenco en la tutmonda petrol-merkato, la nombro de 8 000 laboristoj kaj oficistoj komencis draste malpliiĝi.

Feliĉe, ke, kvankam ni ne havas mem mineralojn — nur la sunon kaj la bluan akvon de la oceano, sed ili ne estas eksporteblaj aŭ ekspluateblaj, oni ŝerce diras — kaj spite de la fakto, ke la vivokostoj estas altaj, tiel ke novaj industrioj ne facile establiĝos ĉi tie, nova eblo sin prezentis: la bela tropika klimato, la klaraj sablaj plaĝoj estis granda rekomendo por turismo. Tamen tute sennuba la ekonomia horizonto ne estas. Kaj probable iom da elmigrado estos necesa. Kaj tio ne estas tiel simpla afero, ĉar la elmigrontoj en la ĵusa pasinteco ĝuis prosperon kaj vivon tropike facilan kaj senzorgan; kaj tio ne estas bona antaŭkondiĉo por elmigro. Jen iom da informado pri malgranda tropika insulo en la Kariba Maro.

Sed, pro speciala cirkonstanco, mi ne ĉesu, antaŭ ol diri ion pri la lingva situacio. La loĝantoj de multaj aliaj insuloj en la Kariba Maro, grandparte posteuloj de afrikaj kaj eŭropaj prapatroj, adoptis la anglan aŭ la francan aŭ la hispanan lingvon. Tri el la ses insuloj (Saba, St. Eustatius, St. Maarten) faris same. Sed Aruba, Curaçao kaj Bonaire havas propran lingvon, nomatan *Papiamentu*.

Babela insulo

Pro historiaj, ekonomiaj kaj nombraj cirkonstancoj ĝi ne estas la oficiala lingvo en lernejoj, administrado kaj magistrato. La lingva situacio en nia 60 000-ho-

Aruba: miniatura Babelo en Kariba Maro

(daŭrigo de p. 47)

ma insulo estas jena: en la lernejo oni instruas en la nederlanda lingvo; en la administrado kaj magistrato la nederlanda estas la oficiala lingvo, sed parole pli multe uziĝas la papiamenta. La lernantoj ĉiam interparolas papiamente, sed facile transiras al pli malpli perfekta nederlanda lingvo, se la okazo tion postulas. La rafinejo kaj ankaŭ la turistoj uzas la amerikan anglan lingvon. Multaj familioj havas rilatojn kun Suda Ameriko aŭ venas de tie, kaj do komprenas kaj parolas la hispanan lingvon. Neniu ĝis nun trovis solvon per akceptita unulingveco. Oni ofte miras, kun kia facileco la homoj meze kleraj transiras de unu lingvo al alia.

Se finance kaj ankaŭ alirilite estus eble, oni prenis la papiamentan kiel la solan oficialan lingvon, same kiel tia estas la afrikansa en parto de Sudafriko aŭ la nov-hebrea en Israelo. Sed tiel simpla la afero ne estas; ekzistas realaj kontraŭmotivoj: estas dubo, ĉu la papiamenta estas nuntempe vortare jam sufiĉe vasta por tia uzo, kvankam tiu estus realigebla, se ne ekzistus aliaj kontraŭmotivoj, ankaŭ financaj. Nun la arubanoj estas devigataj bone lerni la hispanan (sufiĉe parenca al la papiamenta) kaj la amerikan anglan, al kio la televido ankaŭ grave kontribuas, kaj la nederlandan — necesan, se ili volas fari specialistan aŭ universitatan studon en Nederlando. Tial probable tiu ĉi bela ĥaoso daŭros ankoraŭ longe.

Multaj eksterlandanoj perdis (aŭ neniam havis) sian antaŭjuĝon pri la papiamenta, kvazaŭ ĝi ne estus lingvo, kaj lernis la lingvon, kiu por ili funkcias kiel ia interlingvo en la kontakto kun la popolo.

2. PAPIAMENTA LINGVO

Pri tiu lingvo nun iom pli.

Oni povus aserti ke, se Zamenhof estus sciinta la hispanan lingvon kaj (aŭ) la papiamentan (sensenca supozo, mi konsentas), li sendube estus profitinta el ĉi tiu kono. *Papiamento* — tiu vorto signifas parolon, de la verbo *papia* (paroli) — estas tielnomata kreola lingvo, tio estas specialkarakterata mikso de du aŭ pluraj lingvoj.

La afrikaj sklavoj transportitaj ĉi tien ne interkomprenis, ĉar ili estis de malsamaj triboj, kaj precipe ili ne komprenis siajn mastrojn hispanajn (aŭ portugalojn), kaj pere de aŭskultado kaj imitado adoptis kaj *mis*-formis la hispanajn vortojn, adaptante ilin al sia son-sistemo, kaj aŭtomate uzante minimuman gramatikon, estante analfabetoj. Poste, kiam iliaj mastroj ne estis hispanaj sed holandaj, multaj nederlandaj vortoj eniĝis.

Jen koncize kaj ne tro precize la origino de la papiamenta lingvo.

Sed tute ĝenerala konsento pri la origino ankoraŭ ne ekzistas. Estas pluraj teorioj.

1. La unua eblo estus: ke jam en Afriko, kie la diversatribaj sklavoj intermiksiĝis, estiĝis ĉi tiu kre-

ola lingvo, kiu plue evoluis ĉi tie.

2. Pli verŝajne estas, ke la papiamenta estiĝis ĉi tie, do post la alveno de la sklavoj. Sed eĉ en tiu kazo plena certeco rilate al la eŭropa lingvo aŭskultata ne ekzistas. D-ro R. Lenz, kiu verkis en 1928 la libron *El Papiamento, la lengua criolla de Curacao*, en kiu li admire priskribas la papiamentan pro ĝiaj perfektaj kvalitoj de adekvata lingvo, asertas, ke ĝi estas de negra-portugala origino; sed nuntempe, post plua esploro, oni sugestas negra-hispanan devenon, menciante interalie la danĝeron de argumentado el la vortara konsisto: ĉar ŝajnas, ke la tiutempa hispana lingvo havis multajn vortojn egalajn al la portugala. La problemo estas interesa laŭ scienca vidpunkto, sed ne influas la praktikan evoluon de la papiamenta en nia epoko.

Krom la multegaj hispanaj vortoj en la papiamenta estas multaj de nederlanda deveno, kiel mi jam menciis. Post 1927, pro la petrola rafinejo, kaj ankaŭ post la dua mondmilito pro la granda influo de la angla lingvo ĉie en la mondo, pluraj anglaj vortoj eniĝis.

Nun pri la lingvo mem, do ne plu pri la historia aspekto.

Mi ilustras la klarigojn per mallonga teksto en la papiamenta lingvo kun ortografio Esperanta, kvankam tio estas apenaŭ necesa, pro la fakto ke la baldaŭ oficialigota ortografio de la papiamenta multe similas al la Esperanta). La akcenton mi indikis, kiam ĝi diferencas de la Esperanta, per la signo ´. Tuj sekvas kompreneble traduko en la internacian lingvon. Mi prenas la antaŭparolon de la libro: *Páginan pretu di nos história* (Paĝoj nigraj de nia historio) de la konata papiamentologo Antoine Maduro (1961).

“Dia promé di juli 1963 lo nos rekordá un siglo di emansipaşón, e dia ku, 100 anja pasá, tur kati-bu di e sejs íslanan ku ta forma Antíanan Neerlandés a hanja nan libertát.

E buki akí tin dos obheto. Na promé lugá e ke revelá éĉonan históriko relaşoná ku sklavitút ku pa esnan di edát avansá talbés ja a kaj den olvido i ku mayoría di nos hubentút no a tende nunca di nan; na di dos lugá e ke ta un gia pa juda habitántenan di nos íslanan forma un idea di magnitút di e akontesimiento ku nos ta preparando pa komemorá, pasobra pa un pueblo hustipreşá loke el a alkansá den curso di su eksistenşa ta impresindible p’e ta na altura di su pasado. I e pasado ej nos lektornan ta hanja deskribí den e fragméntonan akí, saká for di fuéntenan históriko i fidedigno den tur sentido.”

En Esperanto:

“La unuan de Julio 1963 ni rememoros cent jarojn da emancipiĝo, la tagon kiam, antaŭ cent jaroj, ĉiuj sklavoj de la ses insuloj formantaj la Nederlandajn Antilojn, akiris sian liberecon.

Ĉi tiu libro havas du celojn: unue ĝi volas riveli historiajn faktojn rilate al la sklaveco, kiuj por la personoj grandaĝaj eble jam estas forgesitaj, kaj pri kiuj la pli granda parto de nia junularo neniam aŭdis; due ĝi volas esti gvido por helpi la loĝantojn de niaj insuloj ekhavi ideon pri la grand-

eco de la evento, kiun celebri ni preparas, ĉar por ke iu popolo aprecu, kion ĝi atingis en la daŭro de sia ekzisto, estas necese esti informita pri ĝia pasinteco. Kaj tiun pasintecon la legantoj trovas priskribita en ĉi tiuj fragmentoj, ekstraktitaj el historiaj kaj ĉiurilate fidindaj fontoj.”

Teksto en pli populara lingvo rivelus alian materialon, ekzemple: en la teksto diskutota troviĝas nur unu vorto de nederlanda deveno (la vorto *buki*: libro); kaj tio ne reprezentas la ĝustan distribuon de la diverslingvaj elementoj; plue tia teksto enhavus pli da vortoj el la ĉiutaga vivo, sed estus eble malpli komprenebla pro siaj idiotismoj.

Simpla, sed adekvata gramatiko

Nun iom da klarigo kaj komentario:

Un estas la nedifina artikolo kaj samtempe la baza numeralo (unu); *e* estas la difina artikolo, sed samtempe la persona pronomo de la tria persono (Esp.: li, ŝi kaj ĝi).



Karnavaloj sur Aruba kombinas la buntan gajecon de Sud-Ameriko kun la konataj muzikiloj de la kariba regiono: tamburoj el petrol-bareloj.

La aliaj personaj pronomoj estas: *mi* (mi); *bo* (vi); *nos* (ni); *nan* (ili). Tiuj pronomoj uziĝas samtempe kaj senŝanĝe por la akuzativo kaj por la poseda pronomo, do *mi* povas esti Esperantaj “mi, min, mia(jn)”. Sed, ĉar *e* jam havas duoblan funkcion (artikolo kaj persona pronomo) ekzistas aparta poseda pronomo *su* (bela ekzemplo de lingva kompenso).

La preskaŭ kompleta konjugacio de la verbo ankaŭ troviĝas en nia teksto: *Ta*: esti; *tin*: havi. *Ta* estas uzata por formi la as-tempon: *Mi ta tuma*: mi prenas. *Mi tábata tuma*: mi prenis. *Lo mi tuma*: mi prenos. *Mi a tuma*: mi estas preninta. Por kelkaj oftaj verboj *ta* ne estas uzata, ekz. *Mi ke*: mi volas. *Nos tin*: ni havas. La participo pasiva ofte havas alian akcenton, ol la infinitivo: *sáka*: ekstrakti, sed: *saká*: ekstraktita. En la teksto ni trovas la aktivajn

participojn: *filtrando*, *preparando*.

Nan (ili, ilin, ilia) estas ankaŭ la finaĵo por la pluralo: *éĉonan*: faktoj; *páginan*: paĝoj; *íslanan*: insuloj. *Promé*: unua, do la orda numeralo. La aliajn ordajn numeralojn oni formas el la bazaj antaŭmetante la prepozicion *di* (de), do: ‘la dua libro’ estas: *e di dos buki*. *Ku* estas la rilata pronomo ‘kiu(jn)’, sed ankaŭ la konjunkcio ‘ke’, kaj la prepozicio ‘kun’ (vere akumulado de funkcioj).

La vortordo ne estas libera. Inversio de subjekto kaj verbo preskaŭ ne ekzistas, nur se oni volas emfazi. Ne la vortordo aŭ speciala vorto igas la frazon demanda. Tion faras sole la tono. Kelkfoje la akcento povas ŝanĝi la signifon de vorto: *púra*: pura, sed *purá*: rapide. Por emfazi kvaliton oni ofte ripetas vorton: *bonita-bonita*: belega. Ne ekzistas konkordanco inter adjektivo kaj substantivo: *hendenan grandí*: plenkreskaj homoj. La gramatiko estas vere minimuma, sed tamen adekvata.

Multe da hispandevenaj vortoj

Nun io pri la vortoj: Mi jam diris, ke laŭ la plej probabla teorio, la papiamenta estiĝis el la hispana lingvo (hispanaj dialektoj?) pere de aŭskultado fare de la diverstribaj negroj transportitaj el Afriko ĉi tien. Ne mirige do, ke abundas la hispanaj vortoj.

En nia teksto: *rekordá* (recordar): rememori; *siglo* (siglo): jarcento; *día* (día): tago; *anja* (año): jaro. Rimarko: En la hispana lingvo la finaĵo estas *o*; sed kelkfoje ni vidas en la papiamenta, ke el du malsamaj vokaloj la dua iĝas egala al la unua.

Alia trajto — kiu ne montriĝas en nia teksto, ĉar ĝi ne estas populara lingvaĵo — estas la mallongigo de multaj hispandevenaj vortoj, ekzemple: *kansá* (cansado): laca; *nifiká* (significar): signifi; *maján* (mañana): morgaŭ; *aŭór* (ahora): nun.


En nia teksto troviĝas nur unu vorto de nederlanda deveno: *buki*: libro. Aliaj tiaj vortoj estas: *stul* (stoel): seĝo; *verf* (verf): farbo, el kiu oni derivas *verfdó*: farbisto; *sker* (schaar): tondilo; *kejru* (kuieren, wandelen): promeni; *ember* (emmer): sitelo; *brug* (brug): ponto; *prijs* (prijs): prezo; *belasting* (belasting): imposto; kaj multaj vortoj el administrado kaj magistrato; *kranĉi* (krans): krono. Al multaj nederlandaj vortoj aldoniĝas la finaĵo *i* aŭ *ĉi*: *blaĉi* (blad): folio; *buki* (boek): libro; *hofi* (hof): ĝardeno; *koki* (kok): kuiristo.

Vortoj de angla deveno: *ŭaja* (wire): drato; *taja* (tire): pneŭmatiko, bendo; *brek* (brake): bremsa; *muf* (move): movi; *strajk* (strike): striki; kaj multaj aliaj.

Kaj jen la fino de mia traktaĵo. Se la papiamenta estus mia gepatra lingvo, ĉi tiu traktado povus esti pli interesa kaj pli kompleta. Tamen mi esperas, ke ĝi plaĉis al la legantoj.

La papiamenta ne ludis (kaj ne ludos) rolon en la internacilingva movado, kvankam iam iu proponis uzi ĝin tiel. Sed ĝi estas rimarkinda kaj instrua ekzemplo de neplanita lingvo kun minimuma gramatiko. La vortaro ĝis nun estis hazarde formita (preskaŭ ĉiu nederlanda vorto estis uzebla), sed tiun kutimon nun anstataŭas la tendenco plihispanigi la vortaron.

SUKCESA PREZENTO DE ESPERANTA KULTURO AL LATINAMERIKAJ LEGORONDOJ



Sylla Chaves

Recenzas J. Régulo-Pérez (Hispanujo):

Por um mundo melhor através da poesia e do esperanto / Por pli bona mondo tra poezio kaj esperanto, de Sylla Chaves. Rio de Janeiro: Fundação Getúlio Vargas, 1970. 259 p. 21 cm.

Jam por la tria fojo, laŭ miaj informoj, aperas en Latinameriko krestomatio kun paralelaj tekstoj en landa lingvo kaj en Esperanto. Antaŭe temis pri libroj de s-ino Sánchez-Latour el Gvatemalo kaj de s-ro Fernández-Menéndez el Urugvajo; nun temas pri

nova el Brazilo. Sed ĉiufoje progreso evidentiĝas: senhezite mi agnoskas la nunan la plej bona, same enhave kiel el redakta vidpunkto. Ja ne vane Sylla Chaves estas mem konata poeto.

Post enkonduko pri tradukarto, kie Chaves dokumentas sian ĝisdatecon pri artotradukaj problemoj, li donas sinoptikan panoramon pri la lingvostukturo kaj tuj enirigas la leganton, tra dialoga prozspecimeno, en la mondon de la originala poezio de Esperanto kun poemforma transpontigo. Laŭ mia kompreno Chaves bone sukcesis en sia prezento de nia afero antaŭ vastaj legorondoj latinamerikaj (amerikportugala kaj amerikhispana estas lingvoj konataj al ĉiu tiea edukito), per unu el la plej konvinkaj metodoj, nome per montrado de nia *propra*, kvazaŭ-etniĝinta, kulturo esperantista. La libro bone pravas, ke eĉ se Esperanto ne havus aliajn atutojn, ĝia originala beletro meritegas la penon ellerni la Lingvon Internacian. Ne ĉiuj propagandistoj sciis tiel kernece kaj sagace montri ekzistopravon por nia afero.

Mendu ĉe UEA: Prezo anoncota.

BONHUMORA HELPILO POR GAJIGI KLUBOJN

Recenzas Jorma Ahomäki (Finnlando):

Gajaj klubvesperoj; skeĉoj kaj ludoj, de G. Riisberg k.a. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1970. 32 p. Ofset. 21 cm.

Kurs- kaj klubgvidantoj ofte devas cerbumi, kiel ili povus spici kaj variigi kursvesperojn kaj klubajn kunvenojn. Nova libreto "Gajaj klubvesperoj" proponas sian helpon al ili. Dek unu skeĉoj, longaj kaj malpli longaj, kun kvar ludoj certe donas taŭgan materialon, el kiu ĉiu povas ĉerpi laŭ sia gusto. Per parkera lernado de siaj roloj la partoprenantoj profitos plej efikan utilon. La verketo estas bonhumora kaj plaĉa, sendube do rekomendinda kaj utiligenda. Mallonge dirite ĝi estas bezonata helpilo por instruistoj kaj klubaj funkciuloj.

Mendu ĉe UEA: 2,— gld. + sendokostoj 10%.

INTERNACIIISMO

La vivo fariĝas ĉiam pli internacia.... Tion komprenigas al ni ankaŭ la ĉiutagaj aferetoj de la Centra Oficejo en Rotterdam. Antaŭ nelonge, ekzemple, la Oficejo ricevis per sia *nederlanda* banko monsumon en *usonaj* dolaroj senditan el *Ĉeĥoslovakio* per *franclingva* telegramo de *brazilano* por partopreno de *bulgarino* en la Universala Kongreso en Britujo!

FORPASIS S-INO

J.C. ISBRUCKER-DIRKSEN (1887–1971)

La 14-an de januaro 1971 forpasis en Hago s-ino J.C. Isbrucker-Dirksen, Honora Membro de UEA, 83-jara. Aparte grava estis ŝia signifo por la internacia movado pro ŝiaj multaj talentoj kaj granda laborforto.

Ŝi lernis Esperanton en 1909. Jam baldaŭ poste, estante instruistino, ŝi verkis, kun sia fratino, tre bonan lernolibron, ankoraŭ nun uzatan.

Eksterordinare grava por la plua evoluo de la movado estis ŝia iniciato inviti la 12-an Universalan Kongreson en 1920 al Hago, en tempo, kiam post la unua mondmilito ekzistis grandaj duboj pri la estonteco de la internacia movado.

En 1928 ŝi organizis la internacian Interreligian Konferencon en Hago.

En 1930 ŝi fondis kun Andreo Cseh la Internacian Cseh-Instituton de Esperanto (poste Internacia Esperanto-Instituto). En ĝia kadro ŝi organizis sennombrajn kursojn, seminariojn, prelegvesperojn, vojaĝojn ktp.

En 1931 la urbestro de Arnhem (Nederlando) disponigis grandan domon kun parko, kie la Instituto fondis la faman Esperanto-Domon. Dank' al la organiza talento kaj laborforto de s-ino Isbrucker ĝi fariĝis vigla internacia Esperanto-Centro, kie okazis regule plej diversaj programoj, kursoj, kunvenoj, konferencoj ktp., plej ofte internaciaj.

Intertempe ŝi estis ankaŭ membro de ekzamena ko-



LA KVARA RAKONTARO DE LA NORVEGA AŬTORO J.H. ROSBACH

'Disko' ne estas
disko, sed samtempe
ŝipo kaj libro — de
Johan Hammond
Rosbach.

Recenzas Ueyama masao (Japanujo):

Disko, Ciklo da skizoj, de Johan Hammond Rosbach. Aabyhøj: Dansk Esperanto Forlag, 1970. 110 p. 22 cm.

"Disko", la kvara kolekto de nia unika novelisto Johan Hammond Rosbach, konsistas el 17 noveletoj, kiuj tamen formas ĉenrakonton en la tuto.

La rakonto komenciĝas, kiam oni entreprenas utiligi por hotelo la ŝipon Disko, kiu jam kaduka ne povas plenumi sian taskon kiel veturilo, kaj laŭ la ĉirkaŭvizito de la aŭtoro al la koncernatoj sin prezentas

diversaj homaj sortoj.

Unuopaj epizodoj sufiĉe nin interesas, sed ankaŭ mirindas la strukturo strikta, eĉ tro, simile al tiu de detektiva novelo. Ekzemple, legu "La arkitekto"-n aŭ "Amuzisto"-n.

Kaj cetere, la temo, kiu trakuras ĉiujn pecojn, aparte pensigas nin pri la grava demando: Ĉu morto solvas ĉion?

Nun, laŭvice releginte la kvar volumojn ĝisnunajn de la aŭtoro, mi atingis la konkludon, ke li jam ellasis sin el la kadro de amatoro, kia nomi nin emas eksteroj, kaj per tio li kontribuis ne malmulte al la ĝenro de la originala prozo Esperanta, kiu ankoraŭ ne tre maturas kompare kun la poezio. Devas esti do nature, ke ni kun anticipa ĝuo atendas la plej baldaŭan aperon de la kvina, kiel William Auld prave diras en la antaŭparolo.

Jen alvoko: "Disko" staru sur librobreto de ĉiu literaturamanto!

Mendu ĉe UEA: 6,75 gld. + sendokostoj 10%.

ISBRUCKER



J.C. Isbrucker-
Dirksen

mitato, membro de Internacia Centra Komitato, prezidanto de la floranta haga klubo "Fine ĝi venkos", ŝi gvidis kursojn kaj faris prelegojn en diversaj neesperantistaj medioj. En 1939 ŝi fariĝis sekretariino de ĵus fondita Nederlanda Komitato por praktika aplikado de Esperanto, kies membroj estis i.a. la urbestro de Hago kaj direktoroj de banko, turistoficejo, P.T.T., Philips kaj KLM.

Post la milito, kiam la domo en Arnhem estis detruita, ŝi dediĉis sin al nova afero. Kun Andreo Cseh ŝi fondis la unuiĝon Universala Ligo, mondfederistan organizaĵon surbaze de la verko de Clarence K. Streit. La oficiala lingvo estis Esperanto, sed povis aliĝi ankaŭ neesperantistoj. De tiam ŝi reprezentis Universalan Ligon en internaciaj mondfederistaj kongresoj kaj konferencoj, ĉiam akcentante, ke supernacia federacio bezonas neŭtralan supernacian lingvon. Per sia inteligenta kaj takta argumentado ŝi kreis en larĝaj medioj favoran sintenon rilate Esperanton.

Intertempe ŝi multe verkis kaj tradukis, antaŭ ĉio por la gazeto *La Praktiko*, kiu fariĝis oficiala organo de Universala Ligo. Sed, ĉiam interesiĝante pri filozofio kaj religio, ŝi ankaŭ tradukis en Esperanton la verkon de Martin Kojc, *La lernolibro de la vivo*.

Apenaŭ estas eble doni ĉi tie eĉ nur palan bildon pri tia riĉa kaj valora vivo, plene dediĉita al la afero Esperanto kaj de paco en la mondo. Ripozu ŝi en paco.

M.H. Vermaas

DANIEL CHAGNOUX (1885-1971)


Forpasis Daniel Chagnoux, 75-jara, honora membro de UEA, en la 17a de januaro 1971. De 1937 ĝis 1940 li estis ĉefdelegito por Francujo. En 1938 oni elektis lin kiel komitatanon de UEA. En tiuj jaroj, malfacilaj ankaŭ por UEA, li finance kontribuis al UEA kiel membro-subtenanto kaj al Esperantista Interhelpo, kiu celis savi viktimojn de la diskriminacio, poste de la milito kaj fine la familion Zamenhof. En 1946 li denove laboris kiel kotizperanto de UEA por Francujo. Samjare la Estraro nomis lin inter dek novajn honorajn membrojn, por "esprimi sian dankemon pro fideleco en kriza tempo".

RUDOLF CARNAP (1891-1970)

En Los Angeles mortis profesoro Rudolf Carnap, la monde konata logikisto. Li estis malnova membro de IEL/UEA. Naskiĝinta en Germanujo, Rudolf Carnap estis sinsekve profesoro en Vieno, Prago, Ĉikago kaj Los Angeles. Tri usonaj universitatoj omaĝis lin per honora doktoreco. Li verkis multajn librojn pri logiko, sintakso, semantiko kaj matematiko, tiel en la angla kiel ankaŭ en la germana lingvo. Inter sennombraj filozofiaj studoj li foje pritraktis ankaŭ Esperanton.

JAKUB GARBAR

Forpasis Jakub Garbar en decembro 1970 en Israelo. Li estis aktiva gvidanto dum pli ol 40 jaroj en Wrocław, Pollando. Antaŭ 2 jaroj li translokiĝis al Israelo kaj tie plue gvidis kursojn, fariĝinte la prezidanto de la loka Esperanto-societo en Haifa.



S. U. K. '72 LIEÛO

Almenaŭ de post 1962 esperantistaj sciencistoj estas diskutantaj — iuj realisme, aliaj fantazie — pri efektivigo de grandioza ideo: kreo de universitato kun Esperanto kiel instrulingvo. Oni, kompreneble, ne povis samtempe starigi tiujn tri novajn universitatojn en Afriko, Azio kaj Sudameriko, kiujn estis proponinta trovovulo, kaj bedaŭrinde ankaŭ ne eblis akiri ekslernejon en Danlando. En 1969, kiam d-ro Wim de Smet (universitato de Antverpeno) klopodis plian fojon puŝi la liasupoze kompetentajn esperantistajn sciencistojn direkte al la celo de supera instruado per la Internacia Lingvo, nur manpleno da personoj respondis. Tamen inter la reagintoj estis junaj nederlanda inĝeniero kaj germana instruisto entuziasmitaj de la ideo. Baldaŭ tiu triopo turnis sin al UEA, ISAE, SAT, ILEI, STELO kaj TEJO kun la propono aranĝi plursemajnajn universitatecajn kursojn en 1972. La adresitaj organizaĵoj aŭ komplete silentis aŭ "principe" subtenis la projekton aŭ esprimis aprobon aŭ prokrastis opiniesprimon: neniuj el la ses plej gravaj esperantistaj organizaĵoj deklaris sian pretecon plenenergie kunlabori. La aprobo, kiun profesoro Neergaard eldiris dum sia ISU-prelego en Vieno, kaj la morala apogo fare de dudeko da precipe junaj universitataj instruistoj kaj studentoj, esprimita dum speciala kunveno en la sama urbo, plifortigis la konvinkitecon de la triopo koncerne la ĝustecon de la projekto. Post alelekto de juna belga universitata astrofizikisto, la nun kvaropa komitato (Wim de Smet, André Heck, Wim Jansen kaj Uwe Joachim Moritz) sukcesis havigi al si la subtenon de la rektoro de la universitato de Lieĝo (Belgujo) kaj povas jenon komuniki:

Someraj Universitataj Kursoj (kun Esperanto kiel laborlingvo) okazos unuan fojon de la 30-a de julio ĝis 27-a de aŭgusto 1972 en la novega kvartalo Sart Tilman de la universitato de Lieĝo.

La celo de la Someraj Universitataj Kursoj (SUK) estas kontribui al aplikado de la Internacia Lingvo Esperanto en universitata instruado kaj al pliintensigo de la internaciaj sciencaj kaj universitataj rilatoj. La **programo** konsistas el "studprogramo" kaj "kromprogramo". La studprogramo ampleksos du sekciojn:



Lingvistiko kaj Medicinaj sciencoj.

Ambaŭ sekcioj enhavos diverstemajn kursojn kaj eksterkursajn lekciojn. La lekciojn prezentos universitataj instruistoj, kaj la gruplaborojn gvidos fakuloj. La kromprogramo enhavos interfakajn aranĝojn, Esperanto-kursojn por komencantoj kaj progresintoj, ekskursojn kaj vizitojn, kulturen aktivadon ktp.

La studentoj laboros laŭ jena skemo:

1. En ambaŭ sekcioj, ĉiu semajno estos en si mem kompleta unuo, tiel ke eblas efike ĉeesti ankaŭ dum nur 1, 2 aŭ 3 semajnoj.
2. De lunde ĝis vendrede okazos lekcioj kaj aliaj studaranĝoj. Sabate kaj dimanĉe prezentiĝos eblecoj por ekskursoj ktp.
3. Lekcioj (aŭ, kelkakaze, praktikaj kursoj) okazos antaŭtagmeze, kaj posttagmeze la partoprenantoj individue aŭ grupe traktos la kursobjektojn, dum la vesperoj estos je libera dispono, ekz. por kultura aktivado.


Ekzistos eblecoj ekzameniĝi pri ĉiu kursobjekto.

La **kondiĉoj de partopreno** estas:

1. abiturienteco (aŭ similnivela klereco);
2. minimuma aĝo: 17 jaroj, maksimuma aĝo: 40 jaroj. La SUK-komitato decidos pri esceptoj.

Pri la **kotizo** ankoraŭ ne direblas io definitiva, sed supozeble *kvarsemajnaj loĝado* en komfortaj unulitaj ĉambroj de modernega studenta domo, *manĝado* kaj *programo* kostos proksimume 600 nederlandajn guldenojn. Partopreno dum malpli ol 4 semajnoj kaŭzos esencajn rabatojn. La definitiva kotizo dependas ankoraŭ de tri faktoroj: 1. subvencioj akireblaj, 2. honorarioj pagendaj, 3. evoluo de la prezoj en Belgujo. Pliajn detalojn postulu ĉe: Wim Jansen, Röntgenstraat 32 a, Vlaardingen 3170, Nederlando.

Ĉu vere necesas argumentadi inter esperantistaj kleruloj por tiuj Someraj Universitataj Kursoj? Kelkaj personoj povas opinii, ke SUK '72 estas kondamnita al malsukceso pro manko de kompetentaj lekciistoj kaj de sufiĉe multaj studentoj. Ni esperas tamen, ke la Esperanto-movado ne plu estos tiel senkultura kaj blinda por ne kompreni la signifon de tiaj kursoj, kiuj proksimigos, sur unu el la multegaj gravaj kampoj, la Internacian Lingvon al la stato de aliaj lingvoj.



Novkonstruita
kvartalo de la
universitato de
Lieĝo gastigos la
Somerajn Universi-
tatajn Kursojn en
aŭgusto de 1972.

INSTRUISTA KURSO SEKVE DE KONGRESO

La Trilanda Esperanto-Kongreso, okazinta antaŭ preskaŭ unu jaro en Akeno ĉe la limo belga-nederlanda-germana, ankoraŭ efikas: Surbaze de rekomendo de la distrikta administraci-ĉefo, la distrikta klerigo-sekcio vaste subtenis la klopodojn de la nordrejn-vestfalia sekcio de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj. En la oficiala bulteno de la distrikta klerigo-sekcio aperis du-paĝa artikolo pri la rolo de Esperanto-instruado kun invito al diskut-kunveno. Post dissendo de 1 000 specialaj informiloj kaj pluraj ga-

zetartikoloj okazis en la sidejo de la distrikta administracio diskutkunveno kun ekspozicieto. Sekve komenciĝis fine de novembro 1970 kurso por instruistoj. Partoprenas 8 personoj el diversaj lokoj de la distrikto. La celo de tiu ĉi kurso estas instrui la bazajn elementojn de la Internacia Lingvo ĉiusemajne dum 90 minutoj ĝis somero ĉi-jara. Kelkaj kursanoj jam esprimis la deziron laŭeble baldaŭ ekinstrui Esperanton al siaj gelernantoj....

— KONCIZE EL... —

Hungarujo

- Pliintensiĝas la preparlaboroj por eldono de revueto por gelernejanoj. Sub gvido de Géza Kurucz (adreso: Árpád krt. 13.IV.16., Kecskemet) kolektiĝis redakta komitato seslanda. Oni antaŭvidas la unuan numeron de tiu nepre bezonata revueto por 1972.

Belgujo

- De la 4-a ĝis 7-a de aprilo 1971 okazos en Antverpeno la unua kunordiga konferenco de la esperantistaj instruistaj asocioj de Belgujo, Nederlando, Francujo kaj Germanujo. La celo estas diskuti kaj eventuale decidi pri paralelaj paŝoj por enkonduko de la Internacia Lingvo en la lernejojn de la kvar koncernataj ŝtatoj.

F.R. Germanujo

- Reinhard Haupenthal, universitata instrukomisiito pri Esperanto en Sarlando, publicis en du sinsekvaj numeroj de la bulteno de la sarlanda filologa asocio artikolojn pri Esperanto. En la somera numero de 1970 temis pri detala propono koncerne envicigon de Esperanto-instruado en la reformitan studŝtupon de la gimnazio; la aŭtuna numero prezentas la germanlingvan tradukon de la artikolo de István Szerdahelyi pri "La didaktika loko de la Internacia Lingvo en la sistemo de lernejoj studobjektoj" (*Internacia pedagogia revuo*, n-ro 0).
- Fine de novembro 1970 la nordrejn-vestfalia sekcio de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) eldonis sian unuan numeron de la germanlingva informilo *Esperanto in Schule und Universität* (Esperanto en lernejo kaj universitato), kiun oni sendis al pli ol 1 200 adresoj, precipe en la distrikto Akeno.
- La 9-an de novembro 1970 U.J. Moritz kiel komisiito de AGEI transdonis ĉe la sekretario de la Konstanta Konferenco de la Kulturministroj de la landoj en Federacia Respubliko Germanujo (FRG), Bonn, memorandon pri la instruado de Esperanto en FRG. Tiu teksto aperis intertempe en presita formo (A-5-

formato, 4 paĝoj, germana lingvo) kaj estis sendita al ĉiuj parlamentanoj de la federaciaj landoj de FRG. La folio estas senkoste ricevebla ĉe la redaktoro de tiu ĉi Lerneja Bulteno.

Pollando

- Kvankam jam pasis multega tempo, tamen ankoraŭ valoras raporti, ke dum julio 1970 okazis en Gdańsk metodika kurso por Esperanto-instruistoj. Sub gvido de profesoro A. Grela, Nowy Sącz, 33 geinstruistoj el ĉiuj regionoj de Pollando sekvis prelegojn kaj seminaĵajn programerojn pri esperantologio, metodiko de Esperanto-instruado, gramatiko, laboro kun la junularo, instruhelpiloj ktp. Krome la kursanoj prezentis provleciojn, kiujn oni poste diskutis. Ankaŭ okazis ekskursoj tra la regiono de Gdańsk. 23 kursanoj submetis sin al fina ekzameno antaŭ ŝtata komisiono kaj ricevis la diplomojn.
- En Bydgoszcz kunvenos la 13-an kaj 14-an de aprilo 1971 proksimume 200 geinstruistoj por la 11-a Tutlanda Konferenco de Esperanto-Instruistoj. Oni traktos la temon "Esperanto en laboro de junularaj organizaĵoj". Tiun ĉi konferencon patronos tuta aro da gravaj instancoj vojevodiaj, dank' al kies instigado kreiĝis jam multaj Esperanto-kursoj inter skoltaj, aliaj junulargrupoj kaj en Laboristaj Universitatoj. Organizas PEA, Vojevodio Estraro, ul. Pomorska 23/5, Bydgoszcz, Pollando.

Esperable ĝenis vin...

trovi en tiu ĉi Lerneja Bulteno ne multifacetan superigardon pri la aktivado de esperantistaj instruistoj. Kvankam ĉi tiuj supozeble senĉese agadas tra la tuta mondo, tamen la redaktoron atingas malmultegaj informoj. Bonvolu sendi viajn artikolojn, koncizajn komunikojn, *fotojn*, anoncojn pri kunvenoj kaj raportojn aŭ al la Centra Oficejo de UEA aŭ rekte al la redaktoro de la Lerneja Bulteno.

LOKE

Argentino

- Esperanto fariĝis deviga studobjekto en la lernejo de radio-televidaj parolistoj, kiu funkcias en la kadro de la Supera Instituto por la Sociaj Interkomunikaj Rimedoj ("COSAL", Strato Don Bosco 4002, Buenos Aires).

Belgujo

- Aperis la unua numero de *Land zonder grenzen / Pays sans frontières / Land ohne Grenzen (Lando sen limoj)*, trilingva revuo por orienta Belgujo, nome en la flandra, germana kaj franca lingvoj. Eldonas J. Gouverneur, Hasseltsestraat 41, B-3700 Tongeren.

Britujo

- Okazos kampado kun titolo "Printempa ferio" de la 28-a de majo ĝis la 1-a de junio 1971 en Llana-ber, Kimrujo. Apud la kampadejo troviĝas vilaĝo kun tre longa nomo kimra "Llanfairpwllgwyngyllgogerychwyrndrobwlllantysiliogogoch". Organizas la kampadon J. Gobourne, Bonvenon 28 High Meadows, Compton, Wolverhampton, WV6 8PH.

Eŭropo

- Ĉi-jara Trilanda Kongreso (belga/brita/franca) okazos en Calais, Francujo, de la 29-a ĝis la 31-a de majo. En la programo estos i.a. ekskurso al Tournai, kultura vespero, akceptoj en turismoficejo kaj en la urbodomo.

Finnlando

- Ankaŭ ĉijare okazos Esperanto-kurso en la kadro de Somera Universitato de Turku de la 28-a de junio ĝis la 3-a de julio en Turku. Ĝi celas doni konkretan helpon al tiuj, kiuj jam instruas aŭ estontece instruos la Internacian Lingvon. Multnombraj partopre-

nantoj estas atendataj. Informojn donas Jorma Ahomäki, Piispanristi, Turku.

F.R. Germanujo

- En la Dua Germana Televido (ZDF), en decembro, konata program-prezentisto Wim Thielke parolis favore pri la Zamenhof-tago kaj diris kelkajn frazojn en la Internacia Lingvo, kion sur la ekrano spektis proksimume 30 milionoj da personoj.
- Al ĉiuj 3 550 bibliotekoj en F.R. Germanujo sendis kartoforman formulon por mendo de Esperanto-vortaroj ktp. s-ro Hermann Behrmann, konata kiel la organizinto de 'Esperanto programita'. Li, krome, disdonadis lastatempe proprakoste menditajn alumentojn kaj bestokalendarojn, kiuj ambaŭ mencias la Internacian Lingvon. La alumentkajero enhavas la frazon 'Gewinnen Sie Freunde in 100 Ländern mit Esperanto!' ('Trovu amikojn en 100 landoj per Esperanto!').

Hinda Unio

- Laŭ raporto prezentita al la hinda parlamento pri la landa gazetaro aperis dum 1969 ĉiutagaj gazetoj en 52 lingvoj. Inter tiuj troviĝis 41 hindaj kaj ankaŭ 11 nehindaj lingvoj.

Japanujo

- Dum la pasintjara Universala Ekspozicio en Oosaka, vizitis Japanujon dekoj da esperantistoj eksterlandaj. Laŭ la statistiko de Esperanta Servo-Centro Oosaka, ĝi akceptis sume 26 personojn el 11 landoj.

Pollando

- De la 4-a ĝis la 17-a de majo 1971 okazos Printempaj Esperanto-Ferioj en Lubostroń. Inter la programeroj troviĝos ekskursoj, prelegoj kaj seminario pri 'Esperanto-libro: ĝia signifo en internaciisma edukado'. La Feriojn aranĝas Vojevodia Estraro de Pola Esperanto-Asocio, str. Pomorska 23/5, Bydgoszcz.

Sovetunio

- Eldonis la unuan numeron de *Horizonto de sovetita Litovio* en 1970 la Esperanto-sekcio de Litova So-

Oni foje parolas respektive, sed tro malprecize, pri "la pioniroj de Esperanto". Kiuj estis la pioniroj?

Arkivistoj okupas sin pri la nomoj de fondintoj de societo, sanktuloj de eklezio, inventistoj de fabrika procedo, elpensintoj de filozofia sistemo, esplorintoj de nekonita teritorio. Tiujn nomojn ili povas liveri pli-malpli specife, por ke la malofte dankema mondo honoru ilin.

Ne temas pri daŭra lojaleco, kiu ankaŭ rikoltas meriton, sed pri iniciato; pri malkovro de nova vojo aŭ neatendita vero.

La Veterana Klubo aljuĝas la titolon "Veterano" post 40 jaroj, kaj "Jubileano" post 50 jaroj, sed ŝajne neniu klare difinis la kvalitojn de "Pioniro." Eĉ nia Enciklopedio silentas pri tiu punkto. Ĉu la planata nova eldono pritraktos ĝin?

En miaj fruaj tagoj — mi lernis la lingvon en 1911 — oni kutime rigardis kiel pionirojn tiujn, kiuj partoprenis la movadon antaŭ la fino de la 19-a jarcento — t.e. 1887-1899 inkluzive. Sed nun, laŭ la pli etendita perspektivo de 80-jara historio, tiu kriterio ŝajnas

KIU

apenaŭ justa al pluraj brilaj fervoruloj, kiuj ekinteresiĝis pri Esperanto dum la sesjara periodo, kulmininta ĉe la Unua Kongreso en Bulonjo, 1905.

De post la jaro 1900

Jen nur kelkaj el la eminentuloj, kiuj esperantistiĝis dum tiu fekunda periodo:

- 1900 Boirac, Bourlet.
- 1901 Bulthuis, de Ménil, Möbusz.
- 1902 Bastien, Boulet, Mesny, Mudie, Pitlik.
- 1903 Hodler, Ledger, Merrick, Millidge, Privat, Rollet de l'Isle, Stojan, Vallienne, Warden.
- 1904 Christaller, Couteaux, Höveler, Luyken, Macan, Malmkvist, Muramoto, Neuzil, Ohlsson.



Zamenhof-bankedon en San Francisco partoprenis inter 80 personoj eminentuloj el diversaj kolegioj kaj vesperlernejoj. Parolas la prezidanto de SFERO, Gary Mickle. Aŭskultas: maldekstre la programestro Robert Williams kaj dekstre Harold Dreyer (Kompanio IBM).

cieto de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlandoj kaj Vilnusa Esperanto-Klubo. Ilustrita, 32-paĝa, ĝi prezentas ĉefe kulturan vivon en Litovujo. Kunlaborantoj eksterlandaj povas kontakti kun Esperanto-Sekcio, Societo de Amikeco, Kostiuškos 36, Vilnius, Litova SSR.

- La Esperanta-rusa vortaro, redaktata de prof-o E.A. Bokarev, estas atendata aperi ĝis la komenco de la jaro 1972.

Svedujo

- SEJU, la sveda sekcio de TEJO, eldonis en decembro 1970 la unuan numeron de *Fotnot: en annan språkdebatt* (*Noteto: alia lingva debato*), kiu estas speco de informbroŝuro en la sveda lingvo.

FAKE

Ekspozicio

- La urbo Avignon, Francujo, preparas ekspozicion de desegnaĵoj fare de infanoj kun la temo "Infanoj de la tuta mondo". Ĝi okazos dum julio kaj aŭgusto ĉi-jare. Desegnaĵojn el diversaj landoj atendas s-ino S. Humm, Chemin des Neuf Peyres, F-84-Avignon.

Junularo

- La 1-a markola junularkongreso okazos en Calais, Francujo, de la 29-a ĝis la 31-a de majo 1971, kun belgoj, britoj kaj francoj.

Radioamatoroj

- Antaŭ kelkaj monatoj d-roj V.M. González kaj Petro Magaña, respektive delegito kaj fakdelegito de UEA en Meksiko, skribis kelkajn artikolojn en la organo de la Meksika Ligo de Radioamatoroj *Onda corta*, pri la utileco de la Internacia Lingvo. Inter-tempe d-ro González anoncis en la sama organo korespondan kurson de Esperanto. Post tio alvenadas multaj leteroj de radioamatoroj al li, interalie el Argentino, Nikaragvo. Li utiligas radiofonion por korekti prononcojn ktp.

Skoltoj

- En la monata gazeto por la belgaj skoltoj *Tele*, kun 30 000 ekzempleroj, komenciĝis Esperanto-kurso.

Turismo

- Aperis novaj turismaj prospektoj en Esperanto pri Koszalin (Pollando), Pardubice (Ĉeĥoslovakio) kaj Stoke-on-Trent (Britujo). Oni petu ilin de la urbaj turismaj oficejoj.

Vegetarismo

- Aperis en januaro 1971 la unua numero de "Vegetarano", kiel bulteno de Tutmonda Esperanta Vegetara Asocio. Ofsetita, ĝi ampleksas 12 paĝojn kaj enhavas artikolojn i.a. "Vegetarano en la viandejo" kaj "Ĉu ni manĝu viandon?". La redaktoro estas Ernesto Váňa, Dudince okres Zvolen, Ĉeĥoslovakio.

PIONIRIS ?

1905 Bailey, Bünemann, Butler, Page, Rousseau, Vaughan.

Tiaj estis la sagaculoj, kiuj plej frue perceptis la valoron de Esperanto por la homaro, kaj ili meritis nian omaĝon. Sen ilia sindona, multfaka laboro, nia hodiaŭa situacio estus nekalkuleble malpli firma, ol ĝi estas. Eble iu estonta historiisto kompilos pli kompletan liston, kun biografiaj informoj — kvazaŭ Esperantan Hagiografion.

Sed unue estas dezirinde, ke ni interkonsentu pri difinita findato de la pionira epoko. Mi jam sugestis la finon de 1905, ĉar la Bulonja Kongreso signalis la gravegan paŝon de eksperimento al praktiko. Antaŭ tiu evento malmultaj esperantistoj estis tre certaj, ke la lingvo taŭgos por grandskala parola komunikado, aŭ ke ili eĉ komprenos alinaciajn prononcantojn. Bulonjo triumfe pruvis, ke Esperanto estas vere *vivanta* lingvo — rekta kaj facila ponto inter nacioj.

Tamen eble iuj opinias, ke plej konvena mezuro de la "pionira periodo" estus la unuaj 25 jaroj — t.e. ĝis la fino de 1912. Inter la lernintoj de tiu jarŝepo post Bulonjo troviĝas, maturiĝantaj ĉirkaŭ 1920-30, multaj famuloj, krom centoj — eĉ miloj — da malpli konataj. Do komputu nian hipotezan hagiografon, kies tasko estus ja timiga!

Povas esti, ke aliaj proponoj aperos. Por eviti daŭran disputadon, estus plej bone, ke iu aŭtoritata instanco fiksi arbitre la limdaton, kaj mi sugestas, ke la plej kompetenta instanco por fari tion estas la Akademio.

Tial mi formale invitas la estraron de la Akademio, ke ili voĉdonigu siajn membrojn, kaj laŭ la rezulto deklaru oficialan kaj porĉiaman solvon de la problemo.

Tre malmultaj el la antaŭ-Bulonjaj pioniroj aktuale restas inter ni. Decas, ke ni konservu memoron de ĉiuj, kaj ju pli longe ni prokrastos la taskon, des pli malfacile estos krei bildon de iliaj vivoj kaj talentoj.

Avoto

Kial ne pli detale prezenti la rezultojn?

Skribas Włodzimierz Żytyński (Pollando):

La Belartajn Konkursojn oni aranĝas ĉiujare por stimuli la originalan verkadon en la Internacia Lingvo. Sed kial ĉiuj laboroj de la juĝkomisiono okazadas kvazaŭ malantaŭ fera kurteno kaj neniuj detaloj penetras en la publikon? Laŭ mia opinio la juĝkomisiono havas iusence la moralan devon ne nur juĝi sed ankaŭ edukadi homojn, kiuj verkas en la Internacia Lingvo.

Mi do proponas al la juĝkomisiono: (1) prezenti ĝenerale la valorojn kaj mankojn de la konkursaĵoj, (2) malkaŝi, laŭ kia kriterio oni aljuĝas la premiojn kaj pro kiaj kialoj oni forĵetas aliajn verkojn, kaj (3) ekspliki, kia estas la sorto de nepremiitaj, tamen ne senvaloraj verkoj.


Respondas la sekretariino de la Belartaj Konkursoj:

Jes, vi pravas; la originala Esperanta literaturo ne ricevas sufiĉan instigon, sed tiu literaturo estas nur parto de la tuta larĝa kultura fronto de la movado. Jen mi respondu al viaj proponoj:

(1) Prezenti la valorojn kaj mankojn pri la konkursaj verkoj, konstatitajn fare de la juĝkomisiono, kaŭzus nur ofendojn kaj riproĉojn. Tamen, iom pri la kvalito ĉiujare estas dirite dum la proklama kunveno okaze de la Universala Kongreso.

(2) La maniero de prijuĝo estas difinita en la regulo pri la Belartaj Konkursoj (*Statuto kaj regularoj de UEA*, 1968, p. 35). Konsiderante, ke la prezento detala pri la poentoj donitaj al la konkursaĵoj ne plaĉus al la konkursantoj, la prijuĝaj indikoj restas en la dokumentaro.

(3) La sorto de la premiitaj kaj la nepremiitaj verkoj, se bonkvalitaj, estas publikigo en tre malmultaj revuoj de UEA kaj aliaj revuoj, kun kiuj la Belartaj Konkursoj faris interkonsenton.



Laŭebla
ĝustigo
de
imagoj
pri
aliaj
nacioj

Skribas Ŝibajama Ĵun-iči (Japanujo):

Lastatempe, recenzantino de japana libro imagis "jam antaŭ la legado" sakurajn burĝonojn, geĵsojn ktp. Mi havas nenion kontraŭ la enhavo de la recenzo, sed... Ĉu eŭropano imagas, kiam li legas el Hemingway aŭ Faulkner, verkistoj usonaj, ŝerifon, kakton kaj apaĉon? Abundas tiutemaj kinaĵoj, kaj la similo validas pri samurajo en japanaj filmoj. Sed ni apenaŭ trovas verkon pri samurajo en niaj modernaj verkoj, krom en la ĝenro historia. Nur pensu asociadon de Sartre aŭ Kafka al princino kaj kavaliro sur blanka ĉevalo!

Nia intereso estas ofte pli komuna, se ni vivas en la moderna epoko, kaj tion la recenzo ĝuste montris. Sed per tiu diro, mi ne neas etoson japaneskan. Male, eĉ la plej avangarda el japanaj verkistoj estas forte ligita kun sia lando, eĉ se kontraŭstare.

Mi tamen ne volas akuzi ŝin pro la imagado. Se ŝi ricevis tian bildon kaj nur tian, tio pravas, ke oni disfamis nur tiaspecajn informojn. Sed esperantisto, kiu vidas aferojn sen antaŭjuĝo, nepre klopodu pliĝustigi siajn impresojn pri Japanujo, aŭ pli vaste pri Azio. Kompreneble, la tasko ĉe nia flanko ne estas malpli granda.


Ejro + Ulstro = Irlando

Skribas John G. Osborne (Norda Irlando):

En sia letero (*Esperanto*, n-ro jan. 1971) s-ro Geoffrey Sutton asertas, ke la vorto *Ejro* signifas *Irlando*. Tiu gaela (gaelo = kelto el Skotlando aŭ el Irlando — red.) vorto signifas la sudan parton de la insulo, kiu estas politike ekster Britujo. Se s-ro Sutton rigardos la pli malnovajn monerojn de la Irlanda Respubliko, li rimarkos la vorton *Éireann*, kiu signifas la tutan insulon. Do, Irlando = *Éireann*, kaj Ejro = *Éire*.

La parto de Irlando, kiu estas politika provinco de Britujo, nomiĝas *Ulstro* — vorto, kiu devenas el la angla *Ulster*. Tial oni povas pensi iel pri matematika formulo, jene: Ejro + Ulstro = Irlando.

Eble iun tagon reunuiĝos Ejro kaj Ulstro. Tiam oni nomu la insulon *Irlando*. Dio savu nin de *Ajrlando*!



JUNULARO KAJ KULTURO

La temo de la 27-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, en Edinburgo (8-14 aŭgusto 1971) estas taŭga temo por loko, kiu dum multaj jaroj estis la ĉefurbo de aparta suverena ŝtato — ŝtato, kiu tra la jaroj konservis sian propran identon, siajn proprajn kutimojn, muzikon, literaturon, religion. Per la batalo de Skotlando por ĝia propra personeco ni povas multon lerni pri la potenco kaj graveco de kultura individueco.

Edinburgo estas ankaŭ urbo de monumentoj kaj muzeoj, artgalerio kun internacia reputacio, antikva kaj fama universitato; mallonge, urbo, kiu memorigas nin pri la atingoj kaj valoroj de la okcidenta civilizo.

En la pasinteco, kompreneble, ekzistis tiuj, kiuj klopodis konstrui aliajn Edinburgojn aŭ Londonojn aŭ Parizojn en foraj "sovaĝaj" landoj. Vizitanto al Delhio trovos tie konstruaĵojn nedistingeblajn de tiuj en Princes-strato en Edinburgo; estas kvartaloj de Sajgono tre similaj al la stratoj de Parizo. Hodiaŭ ni skuas la kapon pri la naiveco de la koloniistoj de la deknaŭa jarcento, forgesante, eble, ke tiu banko aŭ amasvendejo en Novjorko havas precizajn imitaĵojn en moderna Singapuro, aŭ Karaĉio, aŭ Accra.

Se tiu deziro igi forajn landojn laŭ la formo de la eŭropaj ankoraŭ ekzistas, pli insida, ĉar pli subtila, estas la sento, ke "okcidentaj" valoroj estas en si mem superaj al tiuj de aliaj mondopartoj. La koloniismo de la pasinta jarcento estis nedisigeble ligita al kristanismo. Hodiaŭ multaj el ni konsideras malĝusta la supozon, ke kristanismo estas supera al aliaj religioj — sed tio estas eble pro tio, ke religiaj aferoj estas malpli gravaj al ni, ol ili tiam estis, ne pro tio, ke ni estas pli klarvidaj ol niaj antaŭuloj. La okcidentaj idealoj pri materia sukceso, ekonomia progreso, kaj "moderneco" pluvivas en aliaj vestoj. Okcidentaj organizaĵoj eksportas lernolibrojn pri la angla kaj fran-

ca lingvoj kun sama pia avideco kiel ĉe la eksportantoj de Biblio kaj preĝlibroj antaŭ cent jaroj, kaj aliaj eŭropaj nacioj tuj postsekvas ilin kun politikaj broŝuroj aŭ kun teknikaj aparatoj por ekspluati tiun novtrovitan lingvan komunecon.

En ĉio ĉi la ideo de "kulturo" estas preteratentata. La vjetnaman kamparanon oni ne konsideras partoprenanto en la komunumo de vjetnamaj valoroj, sed kiel klienton, aŭ politikan konvertiton — aŭ, se ambaŭ tiuj roloj ne plaĉas al li, kiel needukitan stultulon.

Sed gejunuloj iom komprenas pri kulturo. Iliaj propraj vivmanieroj estas ofte malestimataj de iliaj gepatroj. Ĉar ili rifuzas partopreni la ekonomiajn aŭ politikajn valorojn de la gepatroj, ankaŭ ili estas nomataj stultuloj. Ĉar ili kreas la proprajn vivmodelojn, ili estas alterne mokataj kaj ekspluatataj — mokataj de politikistoj, ekspluatataj de komercistoj. Trovante sin kaptitaj inter ekzistantaj valoroj kaj la propraj moralaj idealoj, ili ofte ribelas en ŝajne neraciaj aŭ nerespondecaj manieroj.

Kompreneble, mia rapida rigardo al kulturo kaj kulturoj estas trosimpligita, sed almenaŭ ĝi liveras al nia kongreso tri ĝeneralajn kampojn de esploro kaj studo:

1. Ekspluatado kaj detruado de lingvoj kaj kulturoj de malgrandaj nacioj flanke de la grandaj potencoj;
2. Difinado kaj komprenado de la veraj humanecaj valoroj de la okcidenta kulturo;
3. La karaktero de la junularaj kulturo kaj subkulturoj — ilia estonteco kiel vivmodeloj.

Eble tiuj vastaj kategorioj formas bazon por niaj diskutoj en Edinburgo.

Humphrey Tonkin

□♦□♦□♦□

BAZAJ FAKTOJ PRI LA 27-a IJK

temo: "junularo kaj kulturo"

dato: de la 8-a ĝis la 14-a de aŭgusto 1971

loko: la centro de Edinburgo, Skotlando, Britujo


loĝejo: la kongresejo

Ĉi-sube sekvas kotiztabelo (en guldanoj). La M-kolumno aplikiĝas al individuaj membroj de UEA/TEJO, dum la N-kolumno celas tiujn kongresanojn, kiuj ne estas individuaj membroj.

	ĝis 30 apr 71		post 30 apr 71	
	M	N	M	N
ĝis 21-jaraj	122,40	147,60	136,80	162,00
21-25-jaraj	136,80	169,20	151,20	183,60
de 26-jaraj	151,20	183,60	165,60	198,00


Aliĝilon kun Unua Bulteno vi petu ĉe la sekretario de la 27-a IJK: Ian Parker, 22c Newbattle Terrace, Edinburgo EH10 4RT, Britujo.

La kulturaj festivaloj de Edinburgo kontribuis en la lastaj jaroj al ĝia monda renomo. Ĝuste pri kulturo diskutos TEJO, kiam ĝi kongresos tie en aŭgusto.



Ankoraŭ en la fino de januaro aperis la Unua Parto de la Jarlibro de 1971. Ĝi enhavas 336 paĝojn, el kiuj 315 rilatas al la Delegita Reto. La kompostado kaj fotografado okazis per propraj maŝinoj de UEA, dum la presado kaj bindon prizorgis aliaj firmoj. La Dua Parto aperos en junio aŭ julio kaj enhavos la Estraran Raporton, la Libroliston kaj ĉiujn ceterajn rubrikojn.

Pedro Lamas Días estas la nova Peranto de UEA en Kubo — jam la oka kotizperanto en la landoj de Latin-ameriko. Li raportas, ke kiel antaŭŝtupo por la planata ĝenerala enkonduko de Esperanto en la lernejojn de Kubo jam komenciĝis eksperimenta instruado al kelkaj lernantoj de diversaj niveloj.



ESPERANTO EN RADIO

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16^e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la januaran eldonon.

RADIO WIEN nun dissendas sian programon ĉiun kvaran merkredon (17 marto, 14 aprilo, 12 majo, ktp.) inter 13.00 h kaj 13.45 h per sama ondo: 203 m (1475 kcs). Raportojn, kritikojn, sugestojn al: ORF, Studio Wien, Esperantosendung, A-1041 Wien (Aŭstrujo).

RADIO VALENCIA nun uzas ondon 358 m (836 kcs). Tago kaj horo ne ŝanĝitaj. Leteroj al "La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo" estos bonvenaj.

POLA RADIO. Vidu precizajn ondlongojn en la februara rubriko.

SVISA RADIO. Ni estas informitaj, ke la esperantlingva programo estas aŭdebla en Svislando ankaŭ per "telefonia radio" marde kaj ĵaŭde de 22.45 h ĝis 22.55 h (GMT).

USONA RADIO en Columbus (Ohio) kvin tagojn ĉiusemajne dissendas kurson dum 15 minutoj: stacio WOSU-AM de la ŝtata universitato de Ohio kaj stacio WCBE-FM de la urba lerneja konsilantaro de Columbus.

La fina membro-statistiko pri la kalendarajaro 1970 bedaŭrinde montras malkreskon kompare kun 1969, sendube rezultintan almenaŭ parte el la nova kotiztarifo, kiu ekvalidis en 1970. La individua membro-nombro malkreskis plej multe en Bulgarujo kaj Rum-

La membraro en 1970:

Lando	Individuaj Membroj	Asociaj Membroj	Entute
Alĝerio	3	—	3
Angolo	1	—	1
Argentino	36	254	290
Aŭstralio	139	124	263
Aŭstrujo	90	300	390
Belgujo	145	500	645
Bolivio	1	—	1
Brazilo	218	206	424
Britaj Virgaj Insuloj	1	—	1
Britujo	569	887	1456
Bulgarujo	98	5100	5198
Cejlono	5	—	5
Centra Afrika Resp.	1	—	1
Ĉeĥoslovakio	154	—	154
Ĉilio	1	—	1
Ĉinujo	8	—	8
Danlando	179	917	1096
Etiopio	2	—	2
Filipinoj	1	—	1
Finnlando	280	200	480
Francujo	593	759	1352
Gano	5	—	5
Germana Dem. Resp.	16	—	16
Germanujo (F.R.)	479	1200	1679
Grekujo	30	383	413
Gvineo	1	—	1
Hindujo	13	—	13
Hispanujo	214	392	606
Honduro	1	—	1
Honkongo	4	—	4
Hungarujo	96	3300	3396
Indonezio	7	—	7
Irako	2	—	2
Irano	1	—	1
Irlando	10	15	25
Islando	14	—	14
Israelo	32	200	232
Italujo	271	1300	1571
Japanujo	263	1400	1663
Jugoslavio	216	1500	1716
Kanado	94	138	232
Kenjo	2	—	2
Kipro	1	—	1
Kolombio	11	—	11
Kongo (Dem. Resp.)	7	25	32
Koreujo	21	150	171

1 februaro 1971

anujo. Aliflanke, deko da landoj montras kuraĝigan kreskon, unuavice Koreujo, Grekujo, Sud-Afriko kaj Meksiko, kaj la nombro de landoj kreskis jam la trian jaron sinsekve – de 86 al 89. La nombro de asociaj membroj restis preskaŭ egala al la pasintjara.

Laŭlanda statistiko

Lando	Individuaj Membroj	Asociaj Membroj	Entute
Kostariko	2	—	2
Kubo	5	—	5
Libano	1	—	1
Liĥtenstejno	1	—	1
Luksemburgo	1	—	1
Madagaskaro	11	20	31
Malio	2	—	2
Malto	2	—	2
Maroko	1	—	1
Meksiko	27	—	27
Monako	4	32	36
Mongolujo	3	—	3
Mozambiko	1	—	1
Ned. Antiloj	1	—	1
Nederlando	483	753	1236
Nigerio	1	—	1
Norvegujo	92	435	527
Nov-Hebridoj	1	—	1
Nov-Gvineo	1	—	1
Nov-Zelando	106	227	333
Pakistano	1	—	1
Peruo	7	—	7
Pollando	264	4100	4364
Portoriko	1	—	1
Portugalujo	29	—	29
Reunio	1	—	1
Rodezio	3	—	3
Rumanujo	35	—	35
Senegalio	2	—	2
Sovetunio	109	—	109
Sudafriko	30	30	60
Sudano	1	—	1
Svedujo	543	1000	1543
Svislando	211	110	321
Tajlando	2	—	2
Tanzanio	3	—	3
Tunizio	2	—	2
Turkujo	2	—	2
U.A.R.	5	—	5
Urugvajo	8	25	33
Usono	482	550	1032
Venezuelo	10	—	10
Vjetnamujo	7	—	7
89 landoj	6 840	26 532	33 372

TIU ĈI NUMERO

estas la lasta, kiun vi ricevas, se vi ankoraŭ ne pagis por la abono en 1971.

Se vi ankoraŭ ne reabonis, bonvolu tuj sendi la abonkotizon (vd. en la dua kovrila paĝo de ĉi tiu revuo) al Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando, poŝta ĝirkonto 378964, aŭ al unu el la ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA.

DUMVIVAJ MEMBROJ

Manix, s-ro JC, Harvey, Usono.
Price, s-ro KF, Willowdale, Kanado.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ

Brazilo: 79 ND d'Amorim, 80 CH Dionísio, 81 Domingues C, 82 RP de Melo, 83 EP Nunes, 84 Pádua G, 85 JD Pinto, 86 C Rezende, 87 AJ Vaz, 88 Verde DL. Britujo: 89 W Clarke, 90 EJ Laurie, 91 Phelan HK. Centr-Afrika Resp: 92 H Rousseau. Danlando: 93 T Kehlet. 94 S Larsen. Finnlando: 95 NG Narvala. Francujo: 96 JP Beau. FR Germanujo: 97 Bechtold L, 98 B Hasecke, 99 L Jolliet, 100 T Kraft, 101 FK Kunze, 102 H Schütt, 103 H Wagner, 104 Wingen W. Hispanujo: 105 J Pararnau. Italujo: 106 Minnaja L, 107 RR Sgroi. Nederlando: 108 J Flach, 109 HC Luyke. Norvegujo: 110 O Børresen. Usono: 111 RH Beard, 112 GW Chamberlin, 113 A Correa, 114 GW Harvey, 115 DC Jones, 116 DM Keedy, 117 HB Milsted, 118 PE Nace, 119 E Schultz, 120 W Solzbacher, 121 K Thomson.

DONACOJ

Fondaĵo Azio-Afriko (Amikoj de Hindujo): Italujo: M Bardini 10,—. Sumo ĝisnuna ĉijara 60,—.
Fondaĵo Canuto: Nederlando: FH Kat, 30,—. Sumo ĝisnuna ĉijara 61,96.
Ĝenerala Kaso: Centr-Afrika Respubliko: H Rousseau, 13,—. Danlando: EJ Frost, 5,—. Francujo: R Pons, 9,—. Nederlando: J Aarse, 5,—; FH Kat, 11,65. Sumo ĝisnuna ĉijara 257,80.
Kampanjo "100 x 100": (Por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum tri jaroj ekde 1971 po 100 gld aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj.) 14 E Garraway, Britujo; 15 G Schmidt, FR Germanujo; 16 O Walder, Svislando; 17 M Firme Pimenta, Portugalujo.
Patrono A de TEJO: Britujo: 15 F Parker. Francujo: 16 M Lavarenne. FR Germanujo: 17 H Franck, 18 W Klünder, 19 O Peine. Italujo: 20 L Minnaja, 21 L Terrazzani. Japanujo: 22 Y Umeda. Jugoslavio: 23 P Zlatnar. Kanado: 24 HJ Lewis. Monako: 25 J Derks. Nederlando: 26 AM Slot-vdMeulen. Svedujo: 27 P Almén, 28 Å Näsholm, 29 O Olsson.
Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.
Universala Esperanto-Asocio

ANONCETOJ

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

27-jara fizikisto, komencanto, ŝatas sciencan pensadon. Bv. skribi preslitere al: Muhsin Mohammed Al-Amily, "Yemamah Secondary School", Riadh, Saŭdi-Arabio.

Ne plu aktualas mia januara anonceto prifilatela. Ĉiu skribinto ricevos respondon. Interŝanĝo nedezirata. E. Schuldenfrei, Göteborg.

Mi deziras interŝanĝi aŭ aĉeti ŝakpecarojn de tuta mondo. J.D. Goulding, Retriever Lodge, Tudor Close, Seaford, Sussex, Britujo.

UNIVOX-kurso en Esperanto kaj 22 aliaj lingvoj nun vendiĝas en ĉiu kontinento. Petu informojn de INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio.

Universala Revuo kun adresaro "Esperanto Parolata": abonu aŭ petu specimenon (adreso en Jarlibro). Nova prezo 6,50 gld.

Internacia renkontiĝo (1-15 julio 1971) por kampadistoj, apud Mediteraneo. Informas Lentaigne, 3 av. Gaillarde, 34-Montpellier, Francujo, kontraŭ respondkuponon.

Prelego per diapozitivaj pri Esperanto: ni estas pretaj fari 20 novajn seriojn por antaŭmendintoj. Skribu al Lentaigne, 3 av. Gaillarde, F-34-Montpellier, Francujo, kontraŭ respondkuponon.

Noveldonita turista prospekto en Esperanto okaze de la urba jubileo 1971. Petu senpage de: Turista Oficejo, Parkgatan 2, S-411 38 Gotenburgo, Svedio.

22-jara studento pri la angla lingvo serĉas laboron kaj pensionon dum julio-aŭgusto en Britujo. Kapablas instrui Esperanton, la francan lingvon, (tele-)tajpi ktp. S-ro Cornice Dominique, 1 bis rue Bellavoine C/4, F-78-Le Pecq, Francujo.


Esperanto-programita, instrumaterialo por germanlingvanoj (4 programkajeroj, 4 diskoj, informa broŝuro) nur 20 gmk. aŭ kontraŭvaloron de 25 gmk. per novaj Esperanto-libroj. Hermann Behrmann, D-4972 Löhne 1 E, FR Germanujo.

Esperantistoj, kiuj interesiĝas pri jogo, bonvolu skribi al s-ino Vlasta Obručová, Čajkovského 52, Olomouc 5, Ĉeĥoslovakio.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12 Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Praktikan kovrilon por via jarlibro de UEA vi povas mendi ĉe INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio. Pĉk. 42 66 60 -7. Prezo: Skr 2,60 (4 rpk., 0,50 us. dol., 1,80 gld.).

◀ **S-ro M. M. Al-Amily**



Ludkartoj. Kolektanto volas interŝanĝi neordinarajn ludkartojn. Oni bezonas kartojn kun italaj, hispanaj, francaj, svisaj kaj germanaj emblemoj, ktp. Ankaŭ tarokoj, kaj ludkartoj el Sovetunio kaj orienteŭropaj landoj. Skribu unue, kun plena priskribo, al George Beal, 18 Elmscott Garden, London N21 2BP, Anglujo.

Bonvenon al internacia Esperanto-rondo 24-29 julio en Gotenburgo. Jubilea programo. Ŝipveturo al Londona kongreso 30 julio matene. Favorajn prezojn! Petu informojn tuj! INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio. Telefono: (031) 48 95 97.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA (2040 Springbank Road, Port Credit, Ontario, Kanado) povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi kontraŭ 1 respondkuponon, kompletan liston de siaj programoj.

Radio Svedio baldaŭ havos tri novajn, fortegajn sendilojn por la mondaj programoj. Aktualiĝas disaŭdiĝoj en Esperanto. Proponu, skribu, reskribu al Radio Svedio, Progr. por la mondo, S-105 10 Stokholmo, Svedio. Ref.: INTER-grupo, Gotenburgo.

Ferioj kun senco. Ekkonu danan filozofion kaj danan ferian vivon. Pasigu la antaŭkongresan semajnon (24.7-31.7.71) en la feria centro Kosmos en Danlando. Prelegoj kaj liberaj diskutoj pri esencaj demandoj de la vivo, i.a. pri Esperanto-problemoj. Feriado en bela naturo apud la maro. Ekskursoj al vidindaĵoj kaj historiaj lokoj. Vizitoj en danaj feriaj hejmoj, kie floras intereso pri humanismaj kaj internaciaj demandoj. Petu senpagan broŝuron ĉe Martinus-Instituto, Esperanto-Sekcio, Mariendalsvej 94-96, DK 2000 Kopenhago F, Danlando.

Kontraŭ usona dolaro aŭ egalvaloro vi ricevos serion da italaj aŭ tutmondaj PM, laŭplaĉe. Ĉiam validas. Luigi Toma, Via Tommaseo 15, I-09100 Cagliari, Italujo.

Nova numero de Bulteno kun poŝtkartoj por via korespondado kun Esperanto-lingvaj radiostacioj kaj aliaj estas mendebla. Prezo inkl. 20 pk: Skr 5,20 (8 rpk, 0,50 us. dol., 3,60 gld.). INTER — Societo por la Internacia Lingvo Esperanto en Radio, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio. Pĉk. 42 66 60-7.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton, kio multe helpas al UEA finance. Antaŭdankon!

TRA LA LANDO DE INDIANOJ

de Tibor Sekelj

Vojaĝrakonto de la ĝangaloj de Suda Ameriko.

186 paĝoj.

Prezo: broŝ. 18,60 gld, bind. 23,40 gld.

Mendu ĉe UEA aŭ via kutima libroservo.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Malmö

Svedujo

BONVENON AL GOTENBURGO 1971!

Okaze de la jubilea jaro de Gotenburgo ni kore invitas vin al sestaga restado en internacia, amika Esperanto-rondo, 24-29 julio. Interesa, varia, altkvalita programo. Moderaj kostoj. Ĝustatempa ŝipveturo al UEA-kongreso en Londono favore preze aranĝota por niaj gastoj kaj aliaj esperantistoj. Petu senpagan prospekton: INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box S-400 53 Gotenburgo, Svedio.

Petu ankaŭ novan turistan prospekton en Esperanto, skribante rekte al: Turista Officejo, Parkgatan 2, S-411 38 Gotenburgo, Svedio.

HELPU REKLAMI



LA 56-an

Universalan Kongreson en Londono, uzante sur viaj korespondaĵoj la allogan glumarkon! Folio po 10 markoj kostas 0,50 gld. afrankite (por Nederlando: 0,57 gld. afr-e).

Mendu ĉe UEA

UNUAFOJE EN LA INTERNACIA LINGVO

**Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj
kaj Statuto de la Internacia Kortumo**

Tr. R. Harry, I. Lapenna, E. Svane
Eld. UEA. 96 p. 3,— gld.* afr.

Eldonkvanto limigita!

* En Nederlando: 3,10 gld. afr.



ATENTU!

**ANTAŬ AŬ POST LA LONDONA KONGRESO
VIZITU KEIGHLEY-n,**

*la naskiĝ-lokon de la Brita Esperanta movado kaj
mond-faman Brontë-an Distrikton.*

**LA KEIGHLEY-A ESPERANTA SOCIETO
BONVENIGOS VIN!**

Por broŝuro skribu al:

Town Clerk,
Town Hall,
Keighley,
Yorkshire,
Britujo.

HELSINGØR 1971

40-JARA FERIA KURSARANĜO

La internaciaj feriaj Esp-kursoj de Helsingør okazos 25/7 — 1/8 en La Internacia Altlernejo (tute moderna). Venu al Danlando por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo kaj por partopreni nian 40-jaran jubilean aranĝon. Prospekto senpage havebla ĉe L. Friis, Ingemannsvej 9, DK-8230 Åbyhøj, Dan.


NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 17-23.10. 1971. Programo baldaŭ havebla ĉe L. Friis.

El la lando de Shakespeare

William Auld kaj Reto Rossetti elektis por via plezuro verkojn de la plej elstaraj anglaj aŭtoroj, de Geoffrey Chaucer ĝis William Blake, tradukis kaj tradukigis, redaktis kaj poluris, por ke la

ANGLA ANTOLOGIO

estu vere reprezenta kaj fierinda enkonduko en la anglan belliteraturon. La 320-paĝa volumo estas fortike tolbindita, kun ora surpriso, kaj kostas nur 5,— gld (por Nederlando: 5,20) aŭ £0,60, plus sendkostoj 10%. Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.



D-ro NASSIF ISAAC
D. K. M. D.
MEMBRA MEMBRAS DE
UNIVERSALA ESPERANTO BANCIO
DOKUMENTO NASSIF ISAAC

*Mendoj de ambaŭ rekte al la aŭtoro kostas:
7 rpk.*

Ĝis la 15-a de aprilo 1971 mendoj estas akcepteblaj je la jena adreso:

D-ro Nassif Isaac,
P.O. Box 1221,
Aleksandrio,
U.A.R.

Poste kaj ĝis la 20-a de septembro 1971, la aŭtoro estos ĉe:

16 School Rd.,
Crynant - Neath - Glam.,
South Wales,
Britujo.

La unua tia okazaĵo en la mezoriento. Libro originale verkita en Esperanto kun bele kolorita kovrilo.


Prezo: 5 rpk.

Rpk. oni sendas rekte al la aŭtoro.

Mendoj al la aŭtoro de ne malpli ol 10 ekz-roj rajtas havi rabaton de 10%; de pli ol 20 ĝis 30 ekz-roj, 20%; de pli ol 30 ekz-roj, 30%.

Mendoj de ne malpli ol 30 ekz-roj de *Vojaĝimpresoj de Egipto* rajtas havi rabaton de 50%.

LA DU ASPIROJ DE LA HOMARO
UNU KOMUNA INTERNACIA
LINGVO
KAJ
UNU SCIENCA UNIVERSALA
RELIGIO



DR NASSIF ISAAC
DOKUMENTO NASSIF ISAAC
DOKUMENTO NASSIF ISAAC
DOKUMENTO NASSIF ISAAC
DOKUMENTO NASSIF ISAAC
DOKUMENTO NASSIF ISAAC
DOKUMENTO NASSIF ISAAC
DOKUMENTO NASSIF ISAAC
DOKUMENTO NASSIF ISAAC
DOKUMENTO NASSIF ISAAC

Al la liberpensuloj kaj versercantoj, la aŭtoro prezentas la duan libron, kun bele kolorita kovrilo.
Prezo: 5 rpk.